W. SIEROSZEWSKI

Prezidanto de Pola Literatura Akademio

# MARŜALO JÓZEF PIŁSUDSKI

POLA ESPERANTO ASOCIO

PRESERAROJ

| | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 6 | paĝo | 5 | linio | de supre | anstataŭ | afero | — | aferoj. |
| 6 | „ | 5 | „ | de malsupre | „ | farĝis | — | fariĝis. |
| 9 | „ | 3 | „ | de malsupre | „ | ka | — | ke. |
| 10 | „ | 15 | „ | de supre | „ | rekontis | — | renkontis |
| 14 | „ | 9 | „ | de malsupre | „ | ĥerooj | — | herooj |
| 18 | „ | 12 | „ | de supre | „ | insruistoj | — | instruistoj |
| 18 | „ | 11 | „ | de malsupre | „ | Germonoj | — | Germanoj |
| 21 | „ | 3 | „ | de malsupre | „ | ausraj | — | austraj |
| 24 | „ | 7 | „ | de malsupre | „ | okupanoj | — | okupantoj |
| 31 | „ | 4 | „ | de malsupre | „ | cio | — | ĉio |
| 32 | „ | 5 | „ | de malsupre | „ | naniam | — | neniam |
| 33 | „ | 13 | „ | de malsupre | „ | denĝeraj | — | danĝeraj |
| 44 | „ | 6 | „ | de supre | „ | Regitaro | — | Registaro |
| 47 | „ | 8 | „ | de supre | „ | jaroj | — | jorojn |
| 47 | „ | 15 | „ | de supre | „ | daj | — | kaj |
| 50 | „ | 2 | „ | de supre | „ | Niemczewicz | — | Niemcewicz |

La kovrilon projektis Wacław Falkowski

# MARŜALO
# JÓZEF PIŁSUDSKI

WACŁAW SIEROSZEWSKI
Prezes Polskiej Akademji Literatury

# MARSZAŁEK JÓZEF PIŁSUDSKI

*Życiorys*

Autoryzowany przekład i komentarze
Mgr. Fil. B. STRELCZYKA

POLSKIE TOWARZYSTWO ESPERANTYSTÓW
Warszawa
1934



Marŝalo

Józef Piłsudski

WACŁAW SIEROSZEWSKI
*Prezidanto de Pola Literatura Akademio*

# MARŜALO JÓZEF PIŁSUDSKI

*Biografio*

Kun permeso de l'aŭtoro
tradukis kaj komentariis
Mgr. Fil. B. STRELCZYK

POLA ESPERANTO ASOCIO
Warszawa
1934

Esper 918 II

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

Biblioteka Uniwersytecka KUL
1001144594

Presejo de Fratoj Drapczyński
Warszawa, str. Piusa XI Nr. 15
Pollando

„Ve al popoloj, krucigantaj siajn profetojn...“

La historia justeco kaŭzis, ke la rekonstruo de la sendependa Pola Regno estas por ĉiam ligita kun la nomo de la homo, kies animo aperis kaj formiĝis en la plej malhelaj tempoj kaj en la plej premegataj regionoj de nia Patrujo.

Józef Piłsudski naskiĝis la 5-an de decembro 1867 j en vilaĝo Zułowo de Swięciana distrikto, en Vilna regiono.

Pri la infaneco Józef Piłsudski skribas mem:

„Ĝi okazis en nobela bieneto en Litovujo, ĉirkaŭ dek jarojn post la ribelo. La impresoj de pendigemaj tribunaloj de Muravjev estis ankoraŭ tiel freŝaj, ke la homoj tremis, vidante oficistan uniformon kaj iliaj vizaĝoj kuntiriĝis, kiam en la aero ektondris sonorileto, sciiganta pri la alveno de iu el reprezentantoj de la moskva registaro. En tiu ĉi tempo mia patrino eltiradis iafoje el ia kaŝejo, al ŝi nur konata, kelkajn librojn, kiujn ŝi tralegis, lernigante al ni, infanoj, kelkajn ĉapitrojn parkere. Ili estis verkaĵoj de niaj profetoj. La sekreto, per kiu estis kovrataj tiuj ĉi momentoj, la ekscito de la patrino, transiĝanta la malgrandajn aŭskultantojn, la ŝanĝo de la dekoracio, kiu okazadis, se iu nebezonata atestanto okaze venis dum niaj familiaj konspiroj, ĉio ĉi restigis en nia memoro neforigeblajn impresojn...“ [1]).

„Kaj ankoraŭ nun restis en mia memoro la psalmo: „Estos Polujo en la nomo de la Sinjoro...“, per kiu oni finis ĉiam

[1]) Józef Piłsudski. Pisma — Mowy — Rozkazy. Opa eldono. V. II. „Bibuła“, paĝo 52.

niajn sekretajn hejmajn kunvenojn..." — aldonas en sia memorlibro Bronisław, pli maljuna frato de Józef.

Patro de la familio Piłsudski, ankaŭ Józef, iama ribela komisario en Żmudź, instruita agronomiisto, okupita per la terkultura mastrumado, per sociaj afero kaj scienca laboro, malmulte dediĉis sin al la familio. La infanojn edukadis ĉefe la patrino, sinjorino Marja, laŭ gepatra nomo Billewicz. Varma patriotino, forta, honesta kaj altspirita karaktero, ŝi „ne penis eĉ kaŝi antaŭ ni la doloron kaj espertrompojn kaŭze de la ribelo, sed tute kontraŭe, ŝi edukadis nin, substrekante la neprecon de plua batalo kontraŭ la malamiko de la patrujo..." — skribas Józef Piłsudski [1]).

Komplezema, indulgema kaj samtempe postulema rilate al si mem kaj al la infanoj, ŝi estis en plenumado de siaj devoj severa kaj pura, kiel diamento. Ŝi influis tre la infanojn kaj la kunestantaron. Marŝalo Piłsudski jam post multaj jaroj tiel diris pri tio:

Kiam mi estas en disiĝo kun mi mem, kiam ĉiuj estas kontraŭ mi, kiam ĉirkaŭe leviĝas huragano de indignoj kaj de riproĉoj, kiam la cirkonstancoj eĉ videble estas malamikaj al miaj intencoj — tiam mi demandas min mem, kiel ordonus al mi agi tiuokaze la patrino kaj mi faras tion, kion mi pensas esti ŝia verŝajna opinio, ŝia volo, malatentante jam ĉion ceteran...

Sinjorino Piłsudska mortis (1884 j.) juna, apenaŭ kvardek du jaroj aĝa. Jam antaŭe granda brulego en Zułowo 1874 j., kiu detruis loĝdomon, ĉiujn konstruaĵojn kaj grandan par-

---

[1]) Józef Piłsudski ibid., „kiel mi farĝis socialisto", p. 4. Aliajn informojn pri vivo de familio Piłsudski mi ĉerpas el rakontoj kaj leteroj de Bronisław Piłsudski, el rememoroj de s-ino Marja Piłsudska, la unua edzino de la Marŝalo kaj el indikoj de s-ino Marja Paszkowska kaj de pli maljuna fratino de la Marŝalo, s-ino Zofja Kadenacowa.

ton de arbaro, ruinigis riĉajn ĝis nun gesinjorojn Piłsudski kaj devigis ilin elekloĝi en Vilno. La filoj, edukataj ĝis nun hejme, eniris en ŝtatan gimnazion. Nur tie Józef Piłsudski konatiĝis kun la martiro, pri kiu ĝis nun li sciis el legendo kaj poezio. Rusa pedagogio de Pobiedonoscev, aplikis lernejan sistemon, kiu, kiel martelo, frakasis malfortajn karakterojn. Kun speciala ĝuo oni aplikis ĝiajn metodojn en Polujo. La spionado, turmentado, premegado, subaĉeto, instigado al diboĉo kaj al drinkado — de unu flanko; de alia — la persekutado pro malbona rusa akcento, pro „ne sufiĉe grandrusa spirito" en skribita ekzercaĵo, pro honesteco, pro pureco de la moroj... Senĉesaj atakoj je Polujo, abomenigado de ĝia pasinteco, mokado de malfeliĉa nuntempo — dolore vundis fieran animon de la knabeto, edukita laŭ romantika poezio kaj Plutarĥo.

— Por mi tiuj ĉi rilatoj, tiu ĉi ĉiama timego, ĉiama mensogo, estis io terura. Dum la tuta lerneja tempo mi treege suferis... Kaj eĉ longe poste, kiam dumsonĝe vizitadis min inkubo, ĝi prezentiĝis kiel rusa instruisto!... — ofte rememoris Józef Piłsudski. — La sento de deprimiteco, la sento de sklavulo, kiun oni povas ĉiumomente frakasi per piedo kiel vermon, kuŝis sur mia koro, kiel mueleja ŝtono [1]).

Similaj sentoj ekregis por longa tempo tutan polan socion post sange kvietigita ribelo. Malespero, humiligo, senforteco disŝiras je pecetoj la polan animon. Ĝismorta bezono de kvietiĝo, nepreco pacigi la internan disiĝon kreas sovaĝajn teoriojn pri adaptado al la mallibereco. Oni diras fiere de profesora katedro kaj en gazetaro: „Por kio al ni estas bezonata la ŝtato! Aliaj estu ĝendarmoj, militistoj, policanoj, oficistoj — ĉio, kio premas la vivon! Ni restos nobla nacio de kreantoj — komercistoj, terkulturistoj, industriistoj, me-

---

[1]) Józef Piłsudski. Opa eldono, V. II, p. 6.

tiistoj, scienculoj, artistoj... Ni gardu nur la moron, teron kaj lingvon!"

Oni laŭte mallaŭdis la antaŭajn provojn forĵeti la jugon. Oni publikigis la sendependecon malutila, danĝera revo. Kaj ĝi efektive fariĝis nur lumplena revo por tutaj generacioj, ĝi kaŝiĝis en mallaŭtaj preĝoj de virinoj, en sekretaj fantazioj de poetoj, en la sentemaj infanaj koroj...

Kion tamen estis devinta fari en tiaj kondiĉoj kun sia fiera animo la juneta „Ziuk"? — Tiel nomis la gepatroj, gefratoj kaj domanoj estontan Marŝalon de Pollando. Jam tiam li antaŭsentis duonkonscie, ke li neniam paciĝos kun malhonoro de la renegateco, ke li ne persistos la kelan atmosferon de mallibereco, mallumon de eterna regateco... Post tridek jaroj, kiel gvidanto de potenca revolucia movado, li skribas tiusencan leteron al Ignacy Daszyński.

Oni devas do batali, sed batali unuope estas neeble, li pretigas do por si kunlaborantaron, fondante kune kun frato Bronisław rondetojn por gelaboristoj kaj instruante ilin legi kaj skribi pole. En Vilno, kie estis malpermesate paroli pole sur la stratoj, ĝi estis krimo, punata per malliberejo kaj ekzilo. La fratoj agas tamen konforme al instruoj de la patrino, ke „nur tiu homo indas esti nomata homo, kiu havas certan konvinkon kaj kapablas konfesi ĝin per ago, malatentante la rezultojn..." [1]).

Tamen por ne kaŭzi al la gepatroj persekutadon, la junuloj eĉ kaŝas sin en sia agado antaŭ la proksimuloj. Baldaŭ en ilian klerigan rondetaron trapenetras ekblovoj de la socialismo, alportitaj de studentaro el Petersburg. „Se mi renkontiĝus en tiu tempo kun varsovia socialismo, malkaŝe neanta la naciecajn aferojn kaj kontraŭtstaranta la ribelan tradicion, mi estus tiel rezista je ĝia influo, ke kune kun tiuj ĉi laŭ mi

---

[1]) Józef Piłsudski. Opa eldono, V. II, p. 5.

nebezonataj aldonoj mi forĵetus eĉ la socialistan ideon mem. La petersburg'a socialismo ne postulis tiun ĉi oferon kaj samtempe donis al mi certan gvidfadenon, certan mondkoncepton...' [1]) — skribas Piłsudski pri la influoj. Agordita favore por la socialismo li forveturas en 1885 j. en Ĥarkov'an Universitaton, tie li renkontas sin kun grava revolucia movado de „Nacia volo". Li studas Marks'on kaj rusan revolucian literaturon, sed aliĝi al organizaĵo li ne volas. Malgraŭ granda juneco li kontraŭstaras aktualajn teoriojn en studantaj rondetoj, li komprenas la malsamon de polaj aferoj, li revas pri fondo de socialista organizaĵo en patrolando. — Post malfermo de la Ĥarkov'a Universitato kaŭze de studentaj maltrankviloj li decidis reveni Vilno'n, kaj sekve translokiĝi al Dorpat aŭ forveturi eksterlanden por plua studado. En Ĥarkov li akiris ateston pri du finitaj semestroj de kuracista fakultato. Dumvojaĝe de Ĥarkov al Vilno li vizitas Petersburg'on, kie lia pli maljuna frato Bronisław studas en leĝoscienca fakultato de la Universitato. Tiutempe oni pretigis en Petersburg bombatencon je la caro Aleksandro III-a; implikitaj estas en ĝi vilnanoj: Łukasiewicz, Tytus Paszkowski kaj Bronisław Piłsudski, en kies loĝejo Vladimir Uljanow (naskofrato de Lenin), unu el ĉefaj organizintoj de la atenco, presadis siajn alvokojn. La 20-an de marto oni arestis Józef'on Piłsudski en Vilno kaj transportis lin al Petersburg la 1-an de aprilo (laŭ rusa stilo la 20-an de marto) 1887 j. kaj malliberigis lin en Pietro-Pavlovskaja fortikaĵo, kie sidis jam Bronisław kune kun aliaj kulpigatoj. Post kelkaj monatoj oni permesis al ili intervidiĝi kun ĉagrenigita patro, kiu speciale alveturis, por ilin viziti kaj adiaŭi. Kvankam dum juĝado klariĝis, ka same kiel Bronisław, simile ankaŭ Józef Piłsudski atestis nur al la revoluciistoj kolegajn servojn, ke al la partio „Nacia volo" ili ne apartenis, ke ili

[1]) Józef Piłsudski. Opa eldono, V. II, p. 5.

mallaŭdis la teroron, ke ili opiniis la batalon por ŝanĝi la formon de regadsistemo en Rusujo interna afero de rusoj, havanta duagradan signifon por Polujo — malĝraŭ tio oni kondamnis severe la du fratojn: Bronisław estis punita je dek kvin jaroj de devigaj laboroj sur Saĥalin, Józef — je kvin jaroj de administracia ekzilo al Kireńsk[1]) en Orienta Siberio.

Dum la ekzilo Józef Piłsudski ekkonas perfekte vivon de Ruslando, rusajn tipojn de plej diversaj sferoj kaj diversajn frakciojn de iliaj politikaj direktoj. Li ne estas ravita de ili.

— Ili ĉiuj estas pli aŭ malpli kaŝitaj imperiistoj, senescepte la revoluciistoj. Elementa centralismo estas eco de tiuj ĉi intelektuloj, eterne sopirantaj al absoluteco... Inter ili estas multaj anarĥiistoj, sed mirinde — mi neniam rekontis republikanojn... li diras pri ili. Li studas rusan literaturon kaj refoje li tralegas Marks'on. La abstrakta logiko de tiu ĉi scienculo kaj predikata de li regado de la materio super la homo, neniam konformis al la simpatioj kaj imagoj de Piłsudski, sed li mem konfesas, ke la esplorado de ili fundamentigis lin en la socialismo.

— „Mi komprenis tiam, ke ĝi ne estas nur ideo de noblaj homoj, revantaj pri feliĉigo de la homaro, sed ke ĝi fariĝas reala bezono de la grandega maso de laboranta popolo, ekde kultura kaj socia evolucio ebligas al ĝi kompreni principojn de la ideo. Kaj kiam mi konsideris la nacion, kun kiu ligis min ĉio ĝojiga kaj ĉio doloriga, ĉio en mi pensa - kaj sentakapabla, mi konvinkiĝis, ke miaj infanaj revoj kaj fantazioj kuniĝas kun mia junula mondkoncepto. Socialisto en Polujo devas celadi sendependecon de la patrolando, kaj la sende-

---

[1]) J. Piłsudski, ibid. V. II, p. 7.

pendeco estas karakteriza kondiĉo de socialisma venko en Polujo“ [1]).

La konsentigo de la teoria konsiderado kaj spertoj kun bezonoj de la nobla kaj ĥeroa animo jam tiam faras lin tia, kia li restis por tuta vivo: „romantikulo de la celoj — pozitivulo de la rimedoj“. Li revenas patrolandon kun intenco fondi sendependecan socialistan partion — kreitaĵon tute novan, nekonatan en la historio de la socialismo.

Vojaĝoj tra montoj kaj stepoj, longedaŭra estado en Siberio, komence en Kireńsk (1888 j.), poste en Tunka (1890 j.), ofta ĉasado en ĝiaj neĉirkaŭireblaj arbaroj disvolvas en li eksterordinare viglan trafsenton de la spaco, memoron, kaj sentorganon pri la pejzaĝo, tiel bezonatan al estonta gvidanto.

En 1892 j. li estas jam en patrolando kaj trovas tie komencitaĵojn de Pola Socialista Partio. En novembro 1892 j. okazis jam pariza kongreso de la delegitaro de polaj socialistaj organizaĵoj, dum kiu oni decidis krei partion kun sendependeca politika programo. Oni devis nun disvolvi kaj prilabori la programon, plifortigi la organizaĵon. Piłsudski ne partoprenis la parizan kongreson, sed baldaŭ li renkontis sin kaj interkompreniĝis kun ĝiaj partoprenintoj en Vilno kaj Warszawa.

Sub influo de Józef Piłsudski la tuta vilna grupo, ariĝanta ĉirkaŭ Dominik Rymkiewicz, aliĝas al nova organizaĵo. Somere 1893 j. okazas, sur Ponarskie — montoj, unua kunveno de P. S. P., kiun partoprenas Józef Piłsudski, kaj dum la dua kunveno en Warszawa februare 1894 j. li estas jam elektita membro de Centra Laborista Komitato.

De tiu tempo Józef Piłsudski dediĉas sin al organizado

[1]) „Pisma — Mowy — Rozkazy“. — Pri la afero de Bronisław Piłsudski. V. I, p. 76.

kaj disvolvo de P. S. P. kun tuta fervoro kaj kun ĝusta por li fera volo. Por multaj jaroj li fariĝas sendoma, sennoma konstruanto de la sendependeco de Pollando kaj defendanto de „senfortaj kaj premataj“. Persekutata kiel sovaĝa besto flanke de cara polico, li estas konata al amikoj kaj batalkamaradoj sub kaŝnomo „Wiktor“, kaj poste — „Mieczysław“. Li estas animo, kapo kaj mano de juna organizaĵo. Mi memoras lin tiutempe. Malkorpulenta, malhela brunharulo, rigardanta kuraĝe kaj penetre per grizaj okuloj el-sub malhelaj densaj brovoj. Afabla en interrilatoj, gaja, sprita, malfiera li enportis ĉien multe da humoro kaj entuziasmo. Per sia ekzemplo li instruis kontraŭbatali malhelpojn, eĉ la malvenkojn kun sereneco, trankvilo kaj indeco. Junularo kaj laboristaro apoteozis lin: „Ziuk estis eksterordinare agrabla en ĉiuj rilatoj, li neniam malpacienciĝis, nek indignis, nek kriis, nek malesperis!...“ — diris pri li unu el plej proksimaj kunlaborantoj, Aleksander Sulkiewicz. En 1894 j. li fondas, gvidas, redaktas kaj disvastigas la „Robotnik“, unuan neleĝan gazeton sur teritorio de Pollando de - post 1863 j. El frazeologiaj nuboj unuafoje la programo de P. S. P. surpaŝas vojon de daŭra, konstanta influo je la socio, kreas konstantan legantaron de siaj presaĵoj kaj atingas grandajn impresojn. La signifon de „Robotnik“ taksas ne nur la rusa registaro, sed ankaŭ malhonestaj fabrikposedantoj, kiujn mallaŭdas la gazeto. Inter laboristaro vekiĝas indeco kaj konscio de memforto: estas iu propra, al kiu ili povas plendi kaj kiu defendas ilin. Karakterize estas, ke Piłsudski neniam uzadis argumenton, tiel popularan tiutempe inter socialistoj, tiun de „klasa malamo“. Sed li ofte parolis pri la honoro kaj libereco, pri la valoro de laboro. Sekvante paŝo post paŝo al malproksima stelo de decida batalo kun la okupantoj, li penas renaskigi en pola socio dormetintan kuraĝon kaj memfidon. Sub lia influo la unuama-

jaj demonstracioj transformiĝas malrapide en bataletojn kun militistaro kaj polico. Laborista junularo komencas revi pri la armiloj.

— „Oni devas nepre reenkonduki en spiritan cirkuladon de nia nacio malestimon al subita kaj neatendata morto por superaj celoj!“ — parolis kaj skribis senĉese Józef Piłsudski.

— ...Neniu konsentos morti por plialtigo de perlabora pago je 10 groŝoj... Estas nepre doni al homoj celon, kiu indas la oferojn! Ni volas sendependan Polujon, por ke ni povu tie aranĝi vivon pli bona kaj pli justa por ĉiuj!...“ — li ripetas aliloke. Sekreta presejo de „Robotnik“ estis unue kaŝita en Lipniszki de Oszmiana distrikto, de tie transportita al Vilno, kaj sekve al Łódź ĉe Wschodnia - strato nr. 19. Tie la 22-an de februaro 1900 j. sub kaŝnomo de Dąbrowski estis arestita Józef Piłsudski kune kun edzino Marja, laŭ gepatra nomo Koplewska, dum li kompostis 36-an numeron de „Robotnik“. Malliberigita en X-a Pavilono de Varsovia Citadelo, sekve transportita al Petersburg en malsanulejon de s-kta Nikolao, li forkuris de tie la 13-an de majo 1901 j. kun helpo de Aleksander Sulkiewicz kaj de hospitalestro, P. S. P.-ano, Władysław Mazurkiewicz. Li forveturis por mallonga tempo al Londono, sed jam en 1902 j. li revenas patrolandon kaj ekloĝis por multaj jaroj en Kraków ĉe Topolowa-strato. El Kraków li faras oftajn ekskursojn al Reĝolando kaj ligas kontakton kun P. S. D. P. de Galicio, kies gvidanto estas Ignacy Daszyński. — Li influas la politikan emancipon de polaj socialistoj — el sub aŭstraj kaj germanaj socialistoj. Li partoprenas internaciajn socialistajn kunvenojn, sed jam tiam li rimarkas erarojn de socialista taktiko, bazita sur kredo „al ekonomia disvolviĝo de la historio malgraŭ la homa volo“. En batalo de „elementanoj“ kontraŭ „konspiranoj“, kiu ardas inter polaj socialistoj, li kliniĝas al „organizaĵo“.

— „Nenio fariĝas mem!“ — li ripetas konstante. La sendependeco estas nek elpreĝebla, nek elparolebla, nek elŝakrebla: oni devas esti preta pagi por ĝi per tributo de la sango!...“ [1]).

Kiam eksplodis la japan-rusa milito li provas organizi reziston kontraŭ mobilizo. Sed de komenco li renkontas multajn kontraŭulojn — eĉ en la propra partio P. S. P. — ĉar „ne estas celo de sociala politiko okupi sin pri la militistaro kaj batali per la armiloj!“ Aliflanke kontraŭstaras lin ĉiuspecaj paciĝemuloj, kiuj publike ĵetas fulmotondrojn sur „la krimulojn, dezirantajn ripeti la furiozecon de la 63-a jaro“. La plimulto de la nacio restas pasiva kaj permesas forkonduki centojn da miloj de samlandanoj por buĉado en Manĝurio. Por krei iun aktivan reziston mankis mono, armiloj kaj konforma organizaĵo. Por ne pereigi la militan okazon, Józef Piłsudski ĉirkaŭveturas tutan Pollandon kaj polajn koloniojn en Rusujo, turnas sin al bonstataj homoj, influaj, opiniataj kiel patriotoj, postulante de ili helpon kaj oferojn. Ĉie renkontas lin rifuzo, kaj unuloke eĉ... denunco.

— „Mi revenis Krakovon rompita, preskaŭ malsana. Kie estas la Poloj el „Historiaj Kantoj“, el poezio de Mickiewicz, Słowacki, Krasiński. La ĥerooj kaj oferemuloj elravitaj de la patrino?... La flamaj, minacaj spiritoj, pretaj ekkapti armilojn je la unua sono de batalo por libereco?! Ĝi estis plej peza elreviĝo, kiun mi iam travivis!...“ — diris Józef Piłsudski pri siaj tiutempaj spertoj.

Malgraŭ tio, kiam la japana registaro pere de sia londona sendito turnas sin al Piłsudski kun invito al Tokio por pertrakti pri la pozicio de Polujo en kondukata milito kun Ruslando, li tuj forveturas kune kun Tytus Filipowicz tra

---

[1]) Unua fojon mi aŭdis tiun ĉi lian opinion dum konspira kunveno ĉe s-ino Krakowowa en momento de eksplodo de japan-rusa milito.

Ameriko kaj Trankvila Oceano en Malproksiman Orienton. En ĉefurbo de Japanujo, en parko Ueno, en ĉarma hoteleto Se-je-ken ili loĝas dum kelkaj semajnoj, pertraktante kun oficiroj de la stabo. Tamen samtempe kun Piłsudski alvenis Tokio'n filorusaj Poloj, kiuj akre kaj ĉiumaniere kontraŭstaris la sendependecajn, ribelajn planojn de Piłsudski. Galiciaj konservativuloj en Vieno influas tiutempe la japanan ambasadorejon per malamika premo. Piłsudski ne atingas intencitan celon: li ricevas nek armilojn, nek militistarajn instrukciistojn, nek iun ajn promeson de subteno. Li sukcesis nur atingi apartan tendaron por polaj militkaptitoj kaj plibonan traktadon de ili.

Piłsudski revenas patrolandon kaj renkontas tutplenan mobilizon en Pola Reĝolando. Oni pelas dekojn de miloj de Poloj morti sur kampoj de Manĝurio por potenco de Pollandaj tiranoj kaj por iliaj novaj konkiroj. Por savi la honoron de popolo antaŭ historio kaj por estontaj generacioj, por konservi bruletantajn ankoraŭ fajrerojn de la ribelo kontraŭ la mallibereco, Józef Piłsudski decidas fari lastan provon eltiri ĝin el pasiveco en tiel decidplena momento.

La 13-an de novembro 1904 j. li organizas kun areto de partianoj sur Grzybowski-placo sangan demonstracion kontraŭ la mobilizo. [1]) Eĉ parto de P. S. P. estis kontraŭa al ĝi kaj la tuta paciĝema Polujo eksplodis morgaŭ per freneza indigno; ĝia gazetaro nomas la manifestantojn — „dungatoj de Anglujo kaj Japanujo"; en gazetaro kaj en preĝejoj komenciĝas varma agitado por „lojala mobilizo". Rezulte amasoj de vilaĝanoj kaj laboristoj kun kanto „Kiu sin rekomendos en defendon al sia Sinjoro" iris morti sur kampoj

---

[1]) Bonega plenuminto de la tuta plano estis Józef Kwiatek, pseud. „Tadeusz".

de Malproksima Oriento... por plifortigi la potencon de Ruslando.

Tiel komenciĝis la batalo de Józef Piłsudski „kun Polujo por Polujo!“[1]) Li havis kontraŭ si dum tiu batalo ne nur paciĝemulojn kaj naciajn demokratojn, sed ankaŭ Social-demokration de Pola Reĝolando kaj Litovujo, kaj eĉ parton de P. S. P. Tamen la sanga demonstracio sur Grzybowski-placo atingis gravan moralan rezulton. Ek-de 1863 j. oni unuafoje trapaŝis malfacilan linion, dividantan revojn kaj vortojn de decidaj tragikaj agoj.

Tamen Piłsudski konvinkiĝis, ke estis tre malmultaj kapablaj homoj por tiu celo: Grzybowska demonstracio kaŭzis nenie plu kontraŭmobilizajn maltrankvilojn. Por entrepreni do iam ajn armitan batalon kontraŭ invadoj, oni devis eduki taŭgajn homojn, elserĉi kaj arigi karakterojn, kapablajn ne nur kuraĝe paroli, sinofere morti, sed pretaj forpuŝi faratan al Patrujo perforton kun armiloj en la mano.

En Pollando simila tipo multnombre pereis dum pasintaj ribeloj, kaj de la 63-a jaro preskaŭ tute malaperis en daŭro de kvardekjara trankvilo. Piłsudski kun fera persisto celas ĝian renaskigon en tempospaco de dek jaroj, antaŭ Granda Milito, lerte profituzante ĉiam ŝanĝantajn sin politikajn kaj socialajn kondiĉojn.

Kaŭze de la milita malvenko en 1905 j. en Ruslando eksplodis revolucio... Polujo ne estas al ĝi preparita kaj tiras sin en „la vosto“ de pasiaj kaj kapricaj rusaj movadoj. Piłsudski ne kredas al sukceso de rusa revolucio, ne kredas al ĝia ĝusta solvo de pola demando. Li tre bone konas rusojn, iliajn alcentrajn instinktojn kaj sociajn celadojn.

— Ili deziros feliĉigi nin spite al nia volo!... — li argumentas.

---

[1]) „Józef Piłsudski“ de Dimitr Mereżkowskij. p. 9. Warszawa, 1920 j.

Li opinias, ke sub ŝirmo de la revolucio poloj devas celi kreadon de propra armita forto kaj ŝtata organizaĵo. Li asertas, ke per teroro kaj malgravaj senordaj superfaloj oni nenion profitos politike, ke oni devas nepre prepariĝi al ribelo okaze, se la rusa revolucio prokrastiĝos. Li sukcesas reorganizi malkapablan teknika-batalan organizaĵon, destinitan komence al defendo de kunvenoj kaj manifestacioj, en Batalan Organizaĵon, en famajn „bekojn", perfektigitajn kaj organizitajn laŭ militistara maniero. Ili do en daŭro de longa jaro, spite al tiutempa plimulto de P. S. P., ŝaktenas kaj maltrankviligas policon, militistaron, rusan oficistaron sur la tereno de Pola Reĝolando. En 1906 j. dum kunveno en Lwów Piłsudski defendas en belega, longa parolado la programon de iama P. S. P., sed li estas venkita en voĉdonado de plimulto de la delegitaro. Oni decidis malkleran rezolucion, profunde malfavoran al signaldiro de la sendependenco, kaj dum sekvanta kunveturo en Vieno la sendependeco de Pollando estas forstrekita el programo de P. S. P. En la partio sekvas disiĝo, kreiĝas „sendependeca Revolucia Frakcio": la influoj de P. S. P. malfortiĝas. Semtempe la revolucia movado en Rusujo definitive aliformiĝas en konstitucian movadon. Revolucia Frakcio bojkotas elektojn al Dumo, sed alloga espero de plifaciligo, de ripozo post malfacilaj maltrankviloj kaj de pli bona sorto en estonteco altiras ĉiujn klasojn de pola socio al urno.

Piłsudski ŝajne forlasis la revolucian agadon kaj transportas sian laboron sur tute alian plataĵon konvinkita, ke la konkiraj, tutslavaj fluoj pligrandiĝos en konstitucia Ruslando, kio kaŭzos pli aŭ malpli frue batalon kun la najbaroj, li decidas tuj prepariĝi al estonta milito. Spertoj de la Batala Organizaĵo pruvis, ke per terora vojo oni povas turmenti la konkiran registaron, oni povas eĉ ĝin malfortigi, sed tamen neeble estas forigi ĝin de okupita tereno. Tion fari povas

nur militistaro; nur sub ĝia defendo povas fondiĝi kaj agi Nacia Registaro, embriono de Sendependa Ŝtato.

Piłsudski decidis krei tian militistaron. Li organizas la lastan atakon en Bezdany (la 26-an de septembro 1908 j.) je imposta mono, transveturigata al rusa fisko en Petersburg konforme al vidpunkto, ke „la mono estas neleĝa kontribucio, ĉar pol-rusa milito, komencita de Kościuszko, daŭras ĝis la hodiaŭa tago. La jaroj 1830, 1846, 1863 estas nur ĝiaj grandaj epizodoj.“ Por konkiritaj tie kelkdek miloj de rubloj li organizas unuajn instrukciistajn lernejojn kaj unuajn pafistajn organizaĵojn sur tereno de Malgranda Polujo. Japanaj oficiroj estas unuaj insruistoj en sekreta militistara lernejo eksterlande. Ĉar la Batala Organizaĵo de P. S. P. estis tamen partia kaj klasa organizaĵo, tial por fari ĝin efektiva militistaro, oni devis tute ŝanĝi ĝin, kio okazis ne sen tragediaj konfliktoj. Piłsudski estis devigita detrui per propraj manoj tion, kion li antaŭ nelonge kreis kun tiel granda amo kaj sindediĉo. Piłsudski mem donas tiutempe ekzemplon de intensa esplora laboro, dediĉas sin al militistara studado, sekvigante post si multnombran vicon de junaj historiistoj kaj militistaraj teoriuloj. En tiuj prelegoj li senkompate neniigas la danĝerajn legendojn:

— „Germonoj, Francoj, Italoj, eĉ Rusoj diras kaj skribas multe pri nia kvazaŭa impulsiĝemo kaj batalemo. Ĝi flatas nin kaj ni volonte kredas al ĝi, ni eĉ subtenas ĝin per ekzemploj de niaj antaŭuloj, komencante de Sobieski kaj finante je Legionoj kaj je ribelo de 1863 j. En la infaneco, eĉ longe pli poste, mi kredis al ĝi, nun, post spertoj de 1905 j. mi tute ĝin ne vidas. Kontraŭe, ni senkondiĉe perdis la energion kaj ni devas denove lerni kuraĝecon kaj batalemon. Duonjarcenta paco, manko de propra armeo, teorio de organika laboro, originala anarkismo de la grosŝparemuloj, forĵetanta la neprecon de ŝtata organismo por la nacio, faris

nin plej pacema socio de la mondo. Ni estas idealo de la pacifistoj! Estas vere, ke duomiliono de ni militservas senĉese, kaj pli ol miliono batalos kontraŭ si en okupaj armeoj, se okazos la milito, sed tio interesas nin tre malmulte. Kiam oni militserviĝas filon de pola familio, li tuj fariĝas fremda, detranĉita membro. Ĉie oni estas fieraj pri la militisto, ĉe ni oni hontas la militiston. Kaj tiel estas inter vilaĝanoj, kiuj nomas longe reveninton „moskvano", kiel ankaŭ inter inteligentularo, kiu rememoras la periodon de la militservo, kiel inkubon. Por ke la nacio povu venki sin en tiu sia malfavoro, devas krei propran militistaron, ĝi devas havi propran soldaton, sian amatan defendanton kaj anstataŭanton... Se ni ne kreos la militistaron kaj ne partoprenos la estontan militon de Aŭstrujo kun Ruslando, ni forstrekos nin mem el vicoj de vivantaj popoloj por longa tempo, eble por ĉiam. Oni malatentos nin en Eŭropo... La najbaroj neniigos nin, forprenos de ni la teron kaj malliberigos nin por eterna tempo..." — li diras kaj skribas jam longe antaŭ la Granda Milito.

Sed neniu kredis al ebleco de la milito. Nur la aŭstra anekso de Bosnio kaj Hercegovino kaj ligita kun ĝi malkontento en Rusujo ŝanceligis la kredon al eŭropa ekvilibro. En 1909 jaro fondiĝas en Kraków „Militistara Kaso" kaj en 1910 j. Aŭstrujo permesas fine leĝigi Pafistajn Asociojn, kiuj eliĝis el sekreta organizaĵo de Asocio de Aktiva Batalo. Fondiĝas Pafistaj Taĉmentoj. Pola militista movado disvastiĝas en Galicio per pli larĝa ondo, penetras en Reĝolandon, fondas siajn nestojn eksterlande: en Ruslando, Svisujo, Belgujo, Franclando — ĉie, kie trovas sin ariĝoj de pola studenta kaj laborista junularo. Kiel antaŭe rilate al rondetaro de P. S. P., simile ankaŭ nun Józef Piłsudski gardas kaj gvidas ĉiam la militistarajn organizaĵojn: li ĉirkaŭveturas, kunigas, ekzercigas sur kampoj kaj en tendaro, li instruas en lernejoj,



BIBLIOTEKA UNIWERSYTETU KUL

kaj ĉefe li plivalorigas la spiriton, verkas kredon al propraj fortoj, li stimulas noblajn ambiciojn, starigas altideojn, sinoferindajn celojn... Lin sekvas la amo, obeo, senlima fido... „Komandanto diris!... Komandanto deziras!... Komandanto ordonis!..." — fariĝas sanktaj militistaj ordonoj.

Sed ĉiam ĝi estas apenaŭ malgranda ero de la Nacio. La plimulto estas pasiva, ĉagrenanta kaŭze de ĉiutagaj aferoj, malkonfidema rilate al ĉiu „romantikeco", kaj precipe al ribela romantikeco.

— „Estas sencele ĵeti sin kun pioĉo al la suno! Oni devas esti ne tute prudenta, por revi pri la venko super tri plej grandaj potencoj de la mondo kun helpo de sportistoj, armitaj per tri karabenoj!..." oni mokadis en rondoj de la inteligentularo.

Malgraŭ tio la pafista movado disvastiĝis. Antaŭ eksplodo de la Granda Milito oni kalkulis dek mil pafistojn en Malgranda Polujo. Sed kun mono kaj armiloj estis malbone. En la tago de mobilizo en 1914 j. Piłsudski havis en sia kaso entute 36.000 kronojn kaj kelkcentojn da „verdloj" en magazeno. Kun tiu havaĵo li elmarŝis konkiri la sendependecon de Polujo. Li kredis, ke militaj neprecoj, pola patriotismo, entuziasma kapableco kaj sinofero en decida momento — egaligos ĉiujn mankojn...

La 6-an de aŭgusto 1914 j. laŭ ordono de Józef Piłsudski I-a „kadra" kompanio, konsistanta duonnombre el „Pafistoj", duonnombre el „taĉmentanoj", entute 163 homoj, havanta 100 kronojn en kaso, 163 karabenojn kaj po 200 ŝarĝaĵoj por unu homo trapaŝis limon de rusa okupteritorio kaj komencis batalon kun la malamiko, reganta la du-trionojn de la teritorio de nia Patrujo.

La 12-an de aŭgusto estis okupitaj Kielce de la pafista bataliono kaj de la pelotono de Belin'aj ulanoj, sed post du tagoj la pafistoj, posedantaj neniun artilerion, estis devigitaj for-

lasi la urbon, bombardataj de divizia artilerio de Novikov. Komandanto Józef Piłsudski ne ĉeestis tiam en Kielce, ĉar aŭstra militistara estraro alvokis lin al Kraków. Li renkontis la malataŭenirantajn pafistojn apud Chęciny; li ekhaltis la revenon, disigis rusan postkuron apud Brzeziny kaj kondukis per Tumlin taĉmenton de ĉefo K. Sosnkowski, plifortigitan per alveninta el Krzeszowice taĉmento de Trojanowski, por ĉirkaŭiri rusan militistaron. Rusoj forkuris panike kaj Kielce estis reokupitaj jam por pli longa tempo.

Tia estis la unua ekbrilo de granda milita talento de Marŝalo Piłsudski. — Li suprenlevis kredon, amon kaj fidon de la pola militistaro al sia armeestro sur neniam auditajn altaĵojn, kaj tio fariĝis valorega garantio de estontaj venkoj.

Laŭ planoj de Piłsudski tiumomente, kiam ekpaŝos la pola militistaro sur terenon de Reĝolando, en Warszawa devis formiĝi sekreta Nacia Registaro, kiel reprezentanto de sendependeca celado de Pollando kaj kiel konforma politika anstataŭanto de pola armita forto. Sed homoj, kiuj prenis sur sin la devon organizi Registaron, ne kuraĝis fari ĝin kaŭze de forta rusofila agordiĝo de Warszawa. Józef Piłsudski devis do preni sur siajn ŝultrojn ne nur organizon de pola militistaro kaj ĝian batalan gvidadon, sed ankaŭ la politikan reprezenton de sendependeca direkto, ĉar starigis ĉi tiun signaldiron nek Ĉefa Nacia Komitato en Kraków, nek Nacia Komitato en Parizo. La unua Komitato opiniis, ke Pollando povas renaskiĝi nur en kuniĝo kun Aŭstrujo, la dua — ke ĝi povas nur ekzisti kiel aŭtonomia parto de Rusa Imperio. Oni batalis do por la pensdirekto. Komandanto Piłsudski ekde komenco postulis, kiel celon de sia partopreno en tutmonda milito la tujan kreon de sendependa Pola Ŝtato. Tiu lia malkaŝa pozicio suspektigis lin en aŭsraj okuloj kaj forigis lin, ne sen partopreno de polaj intrigantoj, de la komando super tutaĵo de la Legionoj. Tamen li arigis en

komandata de si I-a brigado tiel multajn kapablajn, entreprenemajn kaj noblajn unuulojn kaj inspiris ilin per tiel granda spirito de hardo, honoro kaj amo al Patrujo, ke la ideologio de la Brigado triumfe radiis je tutan polan socion, malgraŭ ĉiuj malhelpoj kaj persekutadoj. Samtempe dank al lerta batala gvidado sur la fronto Józef Piłsudski per nova gloro kovris polan armilaron. Liajn enterprenojn ĉiam karakterizis: originala, neatandata manovro, surprizigo de kontraŭulo, neordinara rapideco de movoj, subita kaj obstina atako. Per propra ekzemplo de trankvila, persista kuraĝo li edukis tipon de soldato kaj oficiro kun altaj moralaj kaj militistaj ecoj.

— „Por fortigi la batalan linion sendu al ni tuj batalionon de (polaj) pafistoj, aŭ hungaran regimenton aŭ aŭstran divizion..." — skribis germanaj generaloj al komandanto de la fronto. — „Kvin monatoj de sanga kaj malfacila laboro donis al ni gloron de unuagrada militistaro!" — fiere turnas sin Piłsudski al soldatoj en ordono de la 3-a januaro 1915 j. — „La jaro pasis. Vi kreis tiun tipon de la soldato, kiun ĝis nun ne konis ankoraŭ Pollando. Ne la bravureco, nek la soldata brilaĵeto formas nian esencan econ, sed la mirindega trankvilo kaj la ekvilibro en laboro, malgraŭ la malhelpoj!" — li ripetas en la ordono apud Ożarów (la 6-an de aŭgusto 1915 j.).

— „Ĉu post ni restos nur „maldaŭra virina ploro kaj longaj, noktaj babiladoj de samlandanoj" — pruvos la estonteco. Nun ni havas trezoron por defendi, kiun ni sendiskute konkiris. La soldatoj de ĉiuj brigadoj en malfacilaj bataloj, per sangaj oferoj elŝiris de la malamika sorto tion, kion ankoraŭ ni ne posedis, elirinte militi — la honoron de pola soldato!" — li diras en la ordono de la 6-a junio 1916 j.

— „Sinjoroj, mi ne vidis malgajecon sur vizaĝoj de la soldatoj, mi ne aŭdis ĝemon! Mi vidis triumfon kaj fieron,

ke ili estas polaj soldatoj, ke ili verŝas la sangon kaj per ĝi ili pruvas sian militistan servon!..." — li rakontas en artikolo „Pri la valoro de Legiona soldato".

Preskaŭ dum duonjaro nek la militistoj, nek la legionaj oficiroj prenis iun soldatsalajron, nek havis uniformon, piedvestaĵon, armean veturilaron; ili suferis malsaton, malvarmon, ekstreman mizeron... Ili toleris ĉion gaje kaj ĥeroe, ĉar „La Komandanto malpermesis, kaj li scias, kion li faras!"

Aŭstroj opiniis tion esti ribelo kaj fine devigis la brigadon akcepti monon. La sufiĉe serioza sumo estis entute uzita por rekrutvarbado kaj por politika laboro kaj ekipado de novaj taĉmentoj. Sekve oni decidis, ke ĉiu oficiro, sen diferenco de rango, ricevos po 100 kronoj monate, kaj restaĵo estas uzota por politika agado. La Komandanto mem dividis kun la soldatoj feliĉ-kaj malbonsorton, li enrigardadis en ĉiun detalon de ilia vivo, li ŝatis la soldatojn, kaj ili rekompencis lin per fanatika amo. Li manĝis el oficira protvazeto, restadis ĉiam sur fronto proksime de la unua tranĉea linio. Apud Laski li estis kontuzita en la kapon per peceto de ŝrapnelo. Apud Kolki (Koszyszcze) rusa oficiro, militkaptita kaj kondukita en subteraĵon de la Komandanto, ne volis konfesi, ĉar li ne kredis, ke esploras lin Piłsudski, ke la estro de la Legionoj loĝas en malhela, malvasta kaverno, danĝere difektita per kanona pafaĵo. En decidaj momentoj, en lokoj precipe minacitaj, ekapero de la Komandanto kaŭzis entuziasmon kaj vekis nevenkeblan energion; tute elĉerpitoj regajnis forton, malesperintoj rekomencis kredi... Malfortika „nazskrapemulo" en la manoj de la Komandanto fariĝis „fera soldato", kiu mirigadis eĉ spertajn en granda milito fremdlandajn oficirojn.

Sed estis malmulta areto de la Legionoj. Plimulto de la nacio, precipe en la unua periodo de la Granda Milito, kva-

zaŭ senkonscia kaŭze de furiozanta ĉirkaŭe huragano, restis plu en mallibera pasiveco kaj konsterno. Por ĝin elŝiri el rigidiĝo, por ĝin altiri al agado, flamigi per ebleco de akiro de la libereco, Piłsudski sendis jam en novembro 1914 j. el Jakubowice Błotne, dudek kelkajn spertajn legionajn oficirojn al diversaj partoj de Polujo kun politikaj instrukcioj. Sub preteksto de rekrutvarbado ili kreis vastan, sekretan organizaĵon, kiu fariĝis komencitaĵo de glora en konsekvencoj P. O. W. (Polska Organizacja Wojskowa — Pola Militistara Organizaĵo).

Dume la milito disvolviĝis tiel, kiel iam revis pri ĝi Marŝalo Piłsudski, kiam li diris en februaro 1914 j. post prelego en Geografia Societo en Parizo: „Plej feliĉa estos por ni okazo, se Ruslandon venkos Germanujo, kaj Germanujon venkos Francujo!“ Unua duono de la deziro plenumiĝis: Germanujo venkis Ruslandon. En 1916 j. jam ne estis Moskvanoj en la limoj de Pollando, La Komandanto diris tiam al plej konfidindaj:

— „Sur la teritorio de nia Patrujo ni havas nun jam nur du konkirintojn — alvenis tempo turni sin kontraŭ ili!“

En junio de la sama jaro li proponis sian eksiĝon de la komando de la I-a brigado, argumentante tion per tuta vico de kaŭzoj de militistara kaj politika naturo. La paŝo kaŭzis grandan impreson en la legionaj rondoj, kaj kiam la Germanoj translokigis krom tio la legionajn regimentojn sur sian fronton apud Baranowicze, en tuta lando komenciĝis granda, kontraŭ okupanoj direktita movado. Rezulte Aŭstrujo kaj Germanujo publikigis sendependecan dekreton de la 5-a de novembro 1916 j., kreis provizoran Ŝtatan Konsilantaron, al kiu Józef Piłsudski estis invitita, kiel Ministro de la Milito. Sur tiu ĉi posteno Piłsudski lerte utiligis aŭstragermanajn antagonismojn, sed siajn penadojn li direktis ĉefe por plifortigi kaj evoluigi la P. O. W.-on. Sub lia lerta

gvidado la organizaĵo ĉirkaŭprenis tutan landon kaj atingis altan gradon de militistara eduko. En Warszawa estis 8 batalionoj en momento de transdono de P. O. W. al dispono de Provizora Ŝtata Konsilantaro. Germanaj oficiroj, ĉeestantaj ĝeneralajn manovrojn de P. O. W., kie cetere Piłsudski montris al ili nur duonon de siaj „kadroj", estis ravitaj kaj maltrankviligitaj kaŭze de la nova forto. Ili ekpostulis de la Konsilantaro, por ke ĝi enkorpigu ĝin en restaĵon de la Legionoj, ŝanĝitaj en helpan germanan militistaron sub nomo de Wehrmacht[1]).

Dume Rusujo malfortiĝis kaj disfaliĝadis ĉiam pli multe, Piłsudski decidis malkaŝe direkti sian politikon kontraŭ la okupantoj kaj provis jam tiam interkompreniĝi kun la Ŝtatoj de Antanto, malgraŭ, ke ili ankoraŭ kredis al Rusujo. Nur rusa revolucio ŝanĝis iomete tiujn ĉi ŝtatojn rilate al Polujo. Pola militistaro, kreita sur rusa fronto el polaj taĉmentoj de moskva armeo, proklamis la 17-an de junio 1917 j. Piłsudski'n sia spirita armeestro. En P. O. W.-aj sferoj oni konsideris fervore la manierojn transveturigi Piłsudski'n kaj Sosnkowski'n al kelkdekmila armeo de Dowbor-Muśnicki, arigita apud Bobrujsk kaj bone provizita per armiloj kaj municio. Oni projektis uzon de aeroplanoj, sed, ĉu dank' al mallertaj preparoj Germanoj eksciis pri ili, ĉu eble ili volis definitive malebligi ekaperon de Piłsudski sur ĉefa posteno de malamika por ili militistaro, sufiĉas diri, ke ili antaŭ ĉio postulis ĵuron de la Legionoj, post kiu devis sekvi deviga rekrutvarbado, ĉar la varba agado de Ĉ. N. K. malsukcesis dank'al energia kontraŭagado de P. O. W. — Dume la Ŝtata Konsilantaro la 3-an de julio decidis ĵurigi la Legionojn

---

[1]) Kelkajn jarojn poste, post Versaille'a Traktato, la germanoj profituzis la modelon de malamata kaj persekutata de ili P. O. W. por siaj sekretaj organizaĵoj militistaraj.

je „frateco de l'armilaro kaj fidela servo“ kun armeoj de Germanujo kaj Aŭstrio-Hungarujo. Piłsudski kontraŭstaris la ĵuron de la Legionoj kaj eksiĝis el la Ŝtata Konsilantaro. Legionanoj rifuzis la ĵuron. Super la kapo de Piłsudski antaŭeniris jam ombro de malliberejo. Tamen li ne volis allasi al malkaŝa batalo. Kiam kelkajn tagojn antaŭ la 9-a de junio (limtempo de la ĵuro) venis delegitaro de oficiroj de la I-a brigado al la Komandanto kun peto permesi al ili kun armiloj en la mano kontraŭstari la minacantan al la Legionoj internigon en tendaro de militkaptitoj, li diris severe:

— „Ankoraŭ ne venis tempo! La momento estas malkonvena. La nacio, turmentita per rekvizicioj, malsata, timigita per revenĝoj, ne ribelos, ne subtenos vin. Eble ie-tie ribelos iu speciale rabita vilaĝo, iu speciale maljuste traktita urbeto, sed la tutaĵo jam kutimis al novaj sinjoroj, al nova mallibereco... Ribelos P. O. W.-anoj, sed la Germanoj dispremos vin kaj ilin... Nun, kiam ili militgajnis kun Rusujo, ili ne bezonas nin, ili volas liberiĝi de ni... Kaj ne nur de la Legionoj, sed de tuta pola afero... Via ribelo estus preteksto por ruinigi tutan landon... Oni agus kun ni, kiel kun Belgujo, pli malbone, ol kun Belgujo... Ĉar en Belgujo pafis kaj defendis sin virinoj kaj infanoj, kaj ĉe ni neniu defendos sin... Mi ne povas doni al vi mian permeson, kontraŭe: mi postulas, por ke vi ne defendu sin... Mi estas soldato, mi komprenas Vin kaj malfacile estas por mi doni al Vi tiun ĉi ordonon, sed... vi iris sur batalkampon morti por Patrujo, nun vi iru por ĝi en malliberejon...“

Li aldonis nenion pli, sed tiuj, kiuj konis lin, sciis bone, kiel li agos.

— „Mi havis tiam nenion por gajni, nur mian propran morton. Dum momento mi hezitis, ĉu mi ne entreprenu la agadon kun armiloj en la mano. Tamen mi decidis, ke tiam ankoraŭ ne estis konvena tempo, ke la batalo

estus senespera, pro kiu estus respondeca tuta socio. Dum momento mi pensis, ĉu mi ne akceptu sekvantan metodon: sur tereno de aŭstra okupo mi pensis pri ekokupo de Dęblin kun armiloj en la mano kaj pri ĝia posedado ĝis devigo al novaj pertraktoj. Manko de miaj plej certaj regimentoj en Dęblin'a ĉirkauaĵo kaŭzis, ke mi forĵetis la planon. Mi havis decidon veturi en Ruslandon kaj mi preparis eĉ al mi la vojon. Sed la honoro de armeestro ree ekhaltis min. Mi skribis tian leteron al Beseler, ke mi volas partopreni sorton de miaj internigitaj soldatoj..."[1]).

Antaŭ ol la letero alvenis al manoj de Beseler, Piłsudski estis kaptita de Germanoj kaj veturigita en Magdeburgon la 22-an de julio 1917 j. kune kun sia fidela kunlaboranto, stabĉefo, K. Sosnkowski. La aresto estis plirapidigita dank'al publika sinturno de kelkaj samlandaninoj en gazetoj al germana registaro pri aresto de Piłsudski. En Magdeburgo, tute sola, senigita de gazetoj kaj de ĉia kontakto kun ekstera mondo, Piłsudski sidis pli ol unu jaron. Plena malvenko de Germanujo kaj ligita kun ĝi revolucio liberigis lin de tie.

En Magdeburgo skribis La Komandanto unu el siaj plej belaj libroj „Miaj unuaj bataloj", li multe suferis kaj pripensis. Konstanta danĝero minacis Lian vivon, li estis subigita al malfavora sorto de senkompata malamiko, sed Lia ombro el muroj de prusa malliberejo kuŝigis nerompeblan baron al ĉiuj pacemaj german-polaj intencoj. „Pola sendankemeco" kaŭzis al la okupantoj multajn dolorajn sortobatojn en plej gravaj momentoj. Energia agado de P. O. W. en Ukrainujo kaj Blankrusujo en malantaŭo de germana armeo, kaj mobilizo de P. O. W. en Reĝolando dum la Germanoj preparis „duan Marnon", malliberigas germanajn

---

[1]) Krakov'a parolado, 5.VIII.1922., citita laŭ libro de Jan Starzewski: „Józef Piłsudski", p. 161.

fortojn en Pollando. Somere 1918 j. legionaj politikistoj veturas en Rusujon por interkomprenigi kun generalo Lavergne, ĉefo de franca militistara misio. En aŭstra armeo sur itala fronto komenciĝas rapida disfalo de disciplino; regimentoj de „maruderoj“, nomataj „verdaj“, en kiuj sufiĉe grandan rolon ludas legionanoj, enkorpigitaj en aŭstran armeon, — arope foriras hejmen de batala linio. Post rompiĝo de Bulgarujo kaj post malvenko de Germanujo la 31-an de oktobro 1918 j. P. O. W. kune kun estintaj legionanoj senarmigas aŭstran militistaron en Galicio kaj Cieszyn'a Silezio, ekposedas fortikaĵojn, okupas militistarajn magazenojn, kio permesas krei polan armeon. En unuaj tagoj de novembro P.O.W. faris la samon en Lublin kaj aliaj urboj, okupitaj de Aŭstroj. La 6-an de novembro fondiĝas en Lublin unua Registaro de Sendependa Pola Respubliko. Sed en Warszawa kaj sur maldekstra bordo de Wisła ankoraŭ regas la Germanoj, la socio ankoraŭ hezitas — la Ŝtata Konsilantaro dispelas kabineton de Świerzyński, kiu faras nekuraĝan paŝon por sendependiĝi de Germanoj. Rydz-Śmigły sendas el Lublin rajtigitojn kun ordono komenci armitan batalon kontraŭ Germanoj sur stratoj de Warszawa. En tuta lando estas neatendita ekscito kaj maldisciplinigo, minacanta iumomente transformiĝi en hejman militon... La apero de Piłsudski en Warszawa la 11-an de novembro 1918 trankviligas la senordon. Ĉiuj okuloj kaj ĉiuj koroj turnas sin al li kun espero kaj kredo. La Ŝtata konsilantaro transdonas al li la regadon. Li estas aprobita de ĉiuj kiel Ŝtatestro kun diktatora povo. Li sendas tuj deklaracion al ĉiuj Ŝtatoj de Eŭropo kaj Ameriko pri la ekstariĝo de Pola Respubliko kaj petas respekti ĝiajn limojn kaj ĝian suverenecon. Tiu fakto haltigas elsendon de okupa franca, angla kaj itala armeoj al Polujo, kio influus fatale la ekonomian kaj politikan re-

konstruon de Pola Ŝtato, malpliigus niajn limojn ĝis la Curzon'a linio kaj ŝarĝus ĝin per grandegaj elspezoj. Józef Piłsudski kun helpo de siaj malgrandaj fortoj kaj per lerta ilia apliko efektivigas malarmigon de 50.000 Germanoj, kiuj metas la armilojn kaj sen batalo forlasas Reĝolandon, kredante al vorto de Piłsudski, kiun ili konas de batalkampoj, ke li permesos al ili foriri trankvile patrujon. Piłsudski postulas, ke la grandega, kelkcentmila germana armeo el Ukrainujo ne transiru polan terenon, sed ke ĝi ĉirkaŭiru ĝin per fervojoj tra Blankrusujo kaj Litovujo. La Germanoj konsentas, sed perfide ili atakas distrikton Łomża, rabante kaj mortigante loĝantaron. Piłsudski ordonas al P. O. W.-anoj kontraŭbatali kaj minacas al Germanoj per revenĝoj. Apud Biała Siedlecka okazas neegala batalo, kelkcent P. O. W.-anoj mortfalas, sed la Germanoj cedas... En Warszawa Piłsudski penas krei Registaron, konsistantan el reprezentantoj de ĉiuj okupitaj landpartoj kaj de ĉiuj polaj sociklasoj. Li dediĉas tutan sian potencan influon kaj neordinaran intelekton al ideo de kuniĝo de disigita popolo en la krea laboro de Ŝtata konstruado.

Jen kion li diras mem pri siaj penadoj:

— „Estante ankoraŭ en Magdeburgo mi penis prikalkuli ĉiujn eblecojn, ligitajn kun la rezultoj de la milito. Okaze, se malgajnus Germanujo, mi atendis, ke Polujo estos ĉirkaŭota ĉiuflanke de landoj kaj Ŝtatoj, troviĝantaj en ĥaosa stato kaj en serĉado de novaj vojoj por publika vivo. Tiuokaze, mi pensis, ĉio dependos de tio, kiu kapablos unua aranĝi sian domon tiel, ke ĝi estu komforta kaj trankvila loko de ripozo kaj paca laborado por homoj, laciĝitaj de jarlonga milito kaj interna ĥaoso, sed tio estis povebla nur en laŭleĝaj cirkonstancoj, liberaj de la individua ĉu ara despotismo.

Tial, kiam mi ekstaris sur pola tero kaj la sorto metis en miajn manojn la gvidadon de direktilo de pola ŝipo, mi decidis tuj ekprovi antaŭeniĝi rilate al ĉiuj de Centra kaj Orienta Eŭropo en ŝtata konstruado inter universala ĥaoso. Sed oni devis rapidi ne nur pro ĉirkaŭantaro de Polujo. Interne estis sufiĉa ĥaoso — verdire ĝi eĉ teruriĝis min. Dum kelkaj unuaj semajnoj mi ne renkontis eĉ unu homon, grupon aŭ partion, kiun ne ekregus escepta grandecmanio. La jesado: mi aŭ ni kaj la nacio konsistigas la samon — ne forlasis buŝojn; ĉiu ripetis ĝin, ĉiu aspiregis reprezenti Pollandon ekstere kaj interne. Ni estas, laŭ mi, tiel trasorbiĝintaj per la ĥaoso, ke la natura disvolviĝo devis konduki ne al leĝa sinregado, pri kiu mi revis en Magdeburgo, sed al fortaj internaj interpuŝoj kaj al regado de grupa aŭ partia arbitreco.

Mi koncetrigis do ĉiujn miajn penadojn por kunvoki leĝodonan sejmon, kiel unuan ekzemplon por fiksi leĝan sinregadon en la lando. Mi devas al mi atribui, ke ĉion, kio dependis de mi, kaj dependis tiam tre multe, mi faris, por laŭeble plirapidigi la unuan paŝon. Al unua ministraro de s-o Moraczewski mi starigis kondiĉon prilabori kaj publikigi en daŭro de kelkaj semajnoj elektan ordoregularon al Sejmo kaj mi rememorigis ĉiutage pri plenumo de la kondiĉo. Al dua ministraro de s-o Paderewski mi starigis la kondiĉon kunvoki Sejmon ankaŭ en kelksemajna templimo... Kaj ankoraŭ nun, kiam dujara vivo de Pollando en multaj okazoj trompis miajn solecajn revojn kaj magdeburgajn meditadojn, mi agrable rememoras, ke la unua paŝo — la kunvoko de la leĝodona Sejmo por prilabori konstitucion — estis farita en Pollando tute konforme al miaj malliberejaj prikalkuloj, superante tiurilate ĉiujn najbarojn kaj farante surprizon al ĉiuj malamikoj de Polujo.

Tial mi konfesos sincere, ke mi estis fiera komence de fe-

bruaro 1919 j., kiam, rompinte milajn malhelpojn kaj fortan internan kontraŭstaron, mi povis enmanigi la regadon al la Sejmo de renaskiĝinta Pollando" [1]).

Tiutempaj sociaj kaj politikaj kondiĉoj estis terurigaj en Polujo. La lando estis ruinigita, detruita per la milito, malsatigita... Fabrikoj malfunkcias, senigitaj de maŝinoj, centmiloj de senlaboruloj... Cirkulas fremda mono... Malplena fisko... Lwów kaj tuta Orienta Galicio flamegas en fratmurda batalo kun Rutenoj; norde Litovoj baj „bolŝevikoj" okupas polan teron, sude atakas ĝin Ĉeĥoj... Kaj en Warszawa ekfuriozis ĉiuj hejmaj malecoj kaj pasioj, edukitaj de longjara mallibereco... Intrigoj, malpacoj, ruzoj, sovaĝa ludo de ambicioj kaj profitemoj... Aroj de timemuloj kaj malsaĝuloj organizas mitingojn, procesiojn, demonstraciojn, riproĉante al Piłsudski pri ĉiuj malfeliĉoj, kiuj falas sur la Patrujon. Tri okupitaj landpartoj, disigitaj dum 150 jaroj, traktante unu la alian kiel alilandajn potencojn, malobeas al ordonoj de centra registaro, propagandas malpagon de la impostoj. Malobeo al „tia registaro", simile al antaŭaj nobelaraj konfederacioj, fariĝas populara politika signaldiro... Ĉiam oni parolas pri la defendo de kvazaŭaj „rajtoj" — rajtoj, kiuj ne ekzistas ankoraŭ!...

Sed kredo al homo, kredo, ke sur la fundo de la plej malnobla animo vivas certa devosento rilate al socio kaj Patrujo, ke tiu limo de egoismo kaj malsaĝeco estas trovebla kaj antaŭ cio serĉinda — ĝi vivis en Piłsudski ankoraŭ tiel forte, ke li kontraŭstaris la aplikon de ĉiuj perfortaj rimedoj, devigaj rilate al obstinaj intrigantoj, eĉ al atencantoj, — la aplikon de rimedoj, postulataj de homoj el lia ĉirkaŭantaro.

---

[1]) Aŭtografo, enskribita en memorlibro de klubo de Parlamentaj Raportantoj la 19.I.1921 j. Citite laŭ artikolo de A. Anusz: „Vetkuro de la laŭleĝeco", Gazeta Polska, Nr. 325, 28.XI.1931.

Li alvokas militservi la P. O. W. - anojn, kiuj alvenis je lia alvoko el tuta lando en nombro de 50.000 kaj kiuj kreis fundamenton de estonta pola armeo. Tuj ili estis senditaj al ĉiuj frontoj, sed ĉefe al Lwów. [1]).

Li proklamis moralan amnestion, reciprokan kulppardonon, forgeson de riproĉoj. Li mem donis ekzemplojn, li alvokis kunlabori siajn malkaŝajn ĝis nelonge malamikojn, sur altaj postenoj li nomigis eĉ tiujn, kiuj penis mortigi lin, sed li vidu nur ĉe ili penton kaj kapablecon labori. Li fiere kaj silente malatentis la mensogojn de abomenindaj kalumniantoj, paskvilojn, akuzojn, intrigojn de ambiciaj „malgrandeguloj", certa, ke la vero venkos. Li persekutis neniun, li eĉ ne respondis je falsaj akuzoj, pli vere li respondadis... per agoj. Kiam en Warszawa oni bruegis pro la indigno, ke li ne sendis helpon al sieĝita Lwów, li silentis, kvankam jam delonge li sendis tien du-trionojn de armitaj fortoj, kiujn li posedis, li silentis por bono de sukceso, kiu postulis la sekreton. Kiam en malamikaj por li gazetoj kaj sur mitingoj oni riproĉis lin, ke li ne zorgas pri la provincoj Poznań kaj Pomeranio, li sendis sekrete jam multe pli frue siajn fidindajn homojn al Gdańsk kaj Silezio, kien ili estis devigataj penetri tra germanajn limojn kun falsaj atestoj kaj kun celo esplori tie afersituacion kaj veki kuraĝon kaj spiriton [2]). La historio iam malkaŝigos ĉion ĉi.

Pri si mem Piłsudski parolis naniam antaŭe. Modesta, silentema, trolaboranta de mateno ĝis nokto, li vivis solece en trankvila Belvedero. Li forveturis nur tiuokaze, se bezonis tion la Respubliko. Kiel kondiĉon konservi la sendependecon li proklamis la „vetkuron de laboro". Per tiu signaldiro li

---

[1]) J. Piłsudski. „Pisma — Mowy — Rozkazy". V. VI, str. 148. La defendo de Lwów.

[2]) Mi estis unu el la fidindaj senditoj.

altiris la plej bonajn homojn. Li rifuzis al si ĉiun distron kaj ripozon. Dank'al la streĉoplena laboro, kiun li postulis ankaŭ de la ĉirkaŭantaro, li sukcesis eldoni kaj efektivigi tutan vicon de tre saĝaj, celkonsciaj ordonoj, kiuj feliĉe elkondukis la landon el la ĥaoso, minacanta al ĝi per disigo; kelkfoje li forigis hejman militon, savis minacitan sendependecon. Li efektivigis elekton al Konstitucia Sejmo kaj al ĝi, simile al Vaŝington, li transdonis sian diktatoran regoforton. La Sejmo elektis lin unuvoĉe Ŝtatestro. Sur tiu posteno li disvastigis kaj firmigis limojn de la ŝtato. Tiurilate li cedis antaŭ neniu danĝero, nek submetiĝis al fremdlanda aŭ hejma minaco. Li deprenis de „bolŝevikoj" Litovujon, malgraŭ, ke kontraŭ tio protestis angla sendito, malgraŭ, ke malfavore rigardis tion Francujo kaj furioziĝis Germanujo, kiu celis senperan kontakton kun Sovjetlando kaj ĉirkaŭi nin denorde. Li malatentis timeman kriegon de parto de propra socio, antaŭ kiu li iufoje cedis en aliaj okazoj, por ke ĝi povu praktike konvinkiĝi pri siaj eraroj kaj malrapide lerni konsideri kaj regi. Li plu restis edukanto de sia nacio, kiel iam en tagoj de la malliberecо!...

Ŝajnis, ke pasis la plej danĝeraj tempoj, ke Polujo eniras periodon de fruktodona kaj abundplena kreado. Sed la naturaj fiecoj de Poloj, pligrandigitaj ankoraŭ per longedaŭra premado de la malliberecо, plifortiĝis tiutempe. Pli bona, pli nobla parto de la nacio, kiu partoprenis la batalon por la sendependeco, estis ekstereme turmentita per la manko kaj elĉerpita kaŭze de la fortostreĉo. La regadon ekokupis tiuj, kiuj gardis sin „por la nacio": profitegemuloj, karieruloj, ĥerooj de diversspeca perlaboro, ambiciaj nululoj kaj iliaj servistoj, dungeblaj verkistaĉoj, korupteblaj deputatoj, fieraj aventuristoj. Cetera nacio, okupita per la sanigo de ekonomiaj kaj sociaj vundoj, kaŭzitaj de la okupacio kaj senĉesaj militoj — falis en profundan apation... Sur tiu fono

estiĝis dolora batalo de malnobleco kaj egoismo kontraŭ nobleco kaj oferemo, kies personiĝo estis Piłsudski... Tuta ondo de kreskanta kotaĵo atakis lin, kiel malamikan por ili simbolon. Estis neniu kalumnio, kiun oni ne riproĉus al li sekrete aŭ malkaŝe, estis neniu krimo, pri kiu oni ne kulpigus lin, eĉ inkluzive pri la „perfido al la Patrujo", pri la interkompreniĝo kun malamiko kaj pri la ordinara „ŝtelo de la reĝinsignoj". Okazadis eĉ ridindaĵoj, ke sur la bazaro de Warszawa laboreme turniĝis homoj inter aĉetantoj, disvastigante, ke „Piłsudski estas kulpa, ke la pano kaj la salo plikariĝis, ĉar li permesas tion". Piłsudski silentis, okupita per realigo de siaj grandiozaj planoj. Li revis pri la reveno al tradicio de la Jagiellona epoko, kiam Polujo celis krei federacion de Litovujo, Rutenujo kaj Krono. Li komprenis, ke nur Pollando, federacigita kun najbaraj popoloj, sur bazo de nuntempa demokratio, — povas efike kontraŭstari rekonkirajn atencojn je ĝia ekzistado. Li deziregis samtempe doni grandan celon al renaskiĝinta Pola Ŝtato. Ĉar „bolŝevika" Rusujo koncentrigis sian armeon apud limo kaj malkaŝis la intencon ataki „burĝan" Pollandon por kuniĝi kun „komunista" Germanujo, Piłsudski decidis anticipi la invadon, ĥaosigi kaj senplanigi la malamikojn. — Kijeva militiro, sukcese realigita, celis frakasi rusajn sudajn fortojn, kiuj minacis al niaj naftejoj, sen kiuj la defendmilito estus treege malfacila; sekve ĝi celis malebligi eksplodon de „bolŝevika" ribelo en Orienta Galicio, diligente ekscitata de Moskvanoj en la ardaĵo de ĵus pasinta pola-ukraina milito. Dank'al transdono de Kijev kaj de konkirita lando al ukrainaj sendependuloj la militiro devis ligi unuajn nodojn de firma politika amikeco inter estontaj liganoj — Pollando kaj Ukrainujo.[1]).

---

[1]) Dank' al la samaj kaŭzoj Piłsudski redonis al Latvoj Dinaburgon kun ĉirkaŭaĵoj, konkiritan en 1919 j. de Rydz-Śmigły.

La du unuaj celoj estis atingitaj, la tria malsukcesis, ĉar la Ukrainoj estis ankoraŭ tro malfortaj por memstare organizi la ŝtaton, kaj Polujo tiam ne estis tiel forta, por helpi ilin efike en tio. Nia armeo estis devigita forlasi Kijevon kaŭze de la premo de plinombra norda malamika forto, minacanta per detranĉo. Timemaj kaj malkapablaj generaloj, estrantaj atakitan flankon de nia armeo, cedis tiel rapide kaj mallerte, ke en la militistaro estiĝis paniko, Demoralizon en la militistaro subtenis ankoraŭ abomena, kalumnia gazetaro, kiu en la malamo al Piłsudski, malzorgante la sorton de la Patrujo, malfortigis fidon al la Ĉefa Gvidanto en gazetoj kaj flugfolioj, multnombre disĵetataj inter soldatoj. Politikuloj de tiu ĉi frakcio ĝuste jam prepariĝis forlasi Warszawa'n, al kies pordegoj proksimiĝis „bolŝevikaj" bandoj, ili prepariĝis redoni Pollandon por la rabado de la invadinto, por mem savi sian multvaloran vivon kaj havaĵon en provinco Poznań sub ŝirmo de Germanoj kaj... Versaille'a traktato. En Spa jam estis faritaj enkondukaj kontraktoj pri la malpliigo de Pollandaj limoj kaj pri la subiĝo al ordonoj de Anglujo, subtenanta Germanlandon kaj bolŝevikojn. Tiutempe helpis nur Francoj kaj certagrade Hungaroj, sendis oficirojn kaj havigis municion... Francaj strategiistoj konsilis cedi malantaŭ Wisła. Tamen Piłsudski malatentis la konsilon. En la senekzemple malfacilaj tagoj li ne perdis trankvilan staton kaj konsideron. Li ne lamentis, nek malesperis, sed li laboris kun superhoma energio. Li elektis el demoralizitaj per la reveno vicoj pli fortajn, plej parte legionajn batalajn unuojn, kunigis ilin kaj dislokigis tiamaniere, ke ili formis kaptilon, en kies internon ĉiam pli profunden eniris kuraĝintaj dank'al facila venko ruĝaj militistaroj. Li prepariĝis ĝustamomente ataki elflanke, por ringfermi malamikan armeon. Tamen malobeo kaj timemo de certaj korpusestroj plirapidigis la atakon. La 13-an de aŭgusto Piłsud-

ski mem plenumis gloran atakon flanke de Wieprz, kiu liberigis Warszawa'n de bolŝevika masakro kaj disbatis rusan armeon. Tamen ĝia parto, dank'al malbezona plirapidigo de genia manovro, sukcesis eliĝi el la kaptilo kaj Piłsudski estis devigita refoje ĉirkaŭi kaj detrui ĝin apud Grodno. Post la venko la malnobluloj, kiujn forlasis jam la timo, rekomencis intensan agitadon kontraŭ Piłsudski, inversigante ĉiujn leĝojn, eĉ la konstitucion de Pola Respubliko kaŭze de la timo antaŭ la forto kaj genio de tiutempa Ŝtatestro. Ili deziris la antaŭan Polujon, Polujon de privilegioj kaj partioj; Piłsudski komprenis, ke resti kiel forta kaj sendependa Ŝtato, povas nur nova Polujo, justa, humana, nuntempa, kun forta registaro, bazita sur ĝusta Sejmo.

Sed la pola socio ankoraŭ ne maturiĝis por grandaj problemoj, pri kiuj pensis Piłsudski, ĝi restis pasiva dum la batalo de malindaj „infanoj de la malliberečo" kontraŭ dufoja Liberiginto de Polujo. Piłsudski ne volis plu esti „pentrita reprezentanto" de la malpaciĝinta nacio. Li rifuzis la kandidatecon de Respublika Prezidanto kaj starigis kandidatecon de St. Wojciechowski. Tamen popolaj partioj subtenis elekton de Gabrjel Narutowicz, ankaŭ amiko de Piłsudski. Lia tragika fino el mano de fanatika konfesanto de malamikaj al Piłsudski devizoj, kaj sekve senpuna krimglorigo de multnombra parto de pola socio, malfermis nur la okulojn de Piłsudski al senfina falo de kolektiva pola animo. Spite al lia volo montriĝis, ke la homa malnobleco estas, kiel abismo, senfunda, se ne finos ĝin dura, severa kaj punanta mano. Tamen li opiniis, ke ankoraŭ ne venis la tempo por decida ago. Li foriĝis do al hejma kvieta rifuĝejo en Sulejówek, malriĉa kiel Aristido, modesta kaj alpaŝebla, kiel Atilio Semanto, pura kaj nefleksebla, kiel Regulo...

Kvankam la Sejmo dekretis per sia rezolucio, ke „Marŝalo Piłsudski bone meritis al la Patrujo" — la kalumnioj kaj

atakoj de kontraŭuloj de Piłsudski ne silentiĝis. Kontraŭe, ili senbridiĝis kun ankoraŭ pli granda forto, certaj pri senpuneco, ĉar ĉirkaŭ politika gvidilo de Pola Ŝtato troviĝis liaj plej fanatikaj konraŭuloj, malgrandaj homoj, kun grandaj ambicioj, de mezvalora intelekto kaj senigitaj de talenta fajrero. Inter ili komencis gvidadi malhonestaj spekulaciistoj, fiskoŝtelistoj, profesiaj „perfiduloj", spionoj kaj denuncantoj de samlandanoj en tempo de la konkiraj registaroj...

Morala putreco per larĝa ondo disfluis sur la supraĵo de nia vivo, estigante neaŭditan korupcion en ĉiuj sferoj. — Marŝalo Piłsudski observis ĉion atente de sia kvieta rifuĝejo, sed ankoraŭ ne implikiĝis en la okazofluon.

— „Pola animo devas maturiĝi kaj venki sin mem... Tio estas malrapida proceso! Oni devas havi paciencon... Plibonigo de niaj moroj devas esti pagota per malfacilaj kaj doloraj eksperimentoj... Estas neniu alia vojo! Plej flamigaj predikoj, plej saĝaj rezonadoj, plej severaj ordonoj atingos neniun celon... La afero estas jena, ke la eksteraj malamikoj permesu trankvile plenumiĝi al la instruiga proceso!"... — konvinkigis Marŝalo Piłsudski siajn malpaciencajn amikojn.

Se la Marŝalo faris iam ajn la erarojn, ili estis eraroj de la altvalora kaj nobla animo, kiu laŭ sia mezuro estimis pli la homojn, ol ili estis indaj.

Tamen kiam la korupcio ekminacis serioze al la sano, tuteco kaj lerteco de la armeo, tiutempa sola bazo de nia sendependeco, kiam la polaj fikutimoj de iamaj magnataj familioj, renaskiĝintaj en la partieco kaj sejmokratismo, malpermesis krei kapablan administracion kaj fortan registaron — tiam Marŝalo Piłsudski forlasis sian filozofian sindetenon kaj ekestris la renaskiĝan movadon de nova Polujo. La 12-an de majo 1926 j. okazis tritaga sanga batalado sur stratoj de Warszawa. La adeptoj de Piłsudski venkis. Jen

kion deklaris la Marŝalo al reprezentantoj de la gazetaro nokte de 12-a al 13-a de majo:

— „Mi ne povas paroli longe, mi estas tre laca fizike, same kiel morale, ĉar, kiel kontraŭulo de perforto, kion mi pruvis dum la plenumado de Ŝtatestra ofico, mi kuraĝis post longa batalo kun mi mem, je la fortoprovo kun ĉiuj konsekvencoj. Tutan vivon mi batalis por la valoro de tio, kion oni nomas *imponderabilia:* kiel honoro, virto, kuraĝeco, kaj ĝenerale internaj ecoj de la homo, sed ne por klopodi pri la propra profito, aŭ pri la profito de la plej proksima ĉirkaŭantaro.

En la ŝtato ne povas esti tro multe da maljusteco rilate al tiuj, kiuj oferas sian laboron por la aliaj, ne povas esti en la ŝtato — se ĝi ne volas iri al pereo — tro multe da malvirto!“ [1]).

Aliloke li diras kaŭze de tio:

— „La lasta momento, kiu decidigis min, estis fondiĝo de la registaro, kiu rememorigis min pri la malmemorinda registaro, kaŭze de kiu mi eksiĝis de la ŝtatservo, ne dezirante per mia nomo kaj servo subteni homojn, kiuj, laŭ mia opinio, partoprenis en la plej grava krimo, plenumita je Pollando — en la mortigo de La Prezidanto de la Respubliko, Gabrjel Narutowicz, mia persona amiko. La tiurilata senpuneco antaŭjuĝis ĉiurilatan daŭran senpunecon“. [2]).

Tuj post la venko Marŝalo Piłsudski alpaŝis al restarigo de ordo kaj al leĝigo de la revolucio. Li decidis tuj kunvoki la Nacian Parlamenton.

— „Kompreneble, ke tiamaniere mi trompis multajn, atendatajn de mi esperojn kaj mi rezignis de tiel facila en la

---

[1]) J. Piłsudski 1926 — 1929. „Paroladoj, Artikoloj“ kolektitaj kaj preparigitaj por presado de Antoni Anusz kaj Wł. Pobóg-Malinowski, 1930 j., p. 25.

[2]) Ibid. „1926 — 1929“, p. 30.

ekkrioj formo, kiel diktatoreco de unu homo. Tamen mi faris ĝin plenkonsidere kaj decidkonscie, malgraŭ, ke mi fidas al miaj fortoj kaj al mia interna valoro. Kaj mi agis tiel, por ke oni dekutimiĝu ĉe ni en Polujo troŝarĝi nur unu homon, malvolonte helpante lin poste, sen havigado de ĉiutaga solida laboro al multnombraj homoj, nepraj por reformi la kutimojn, cetere tiel forte kritikatajn en la tuta ŝtata aparato" [1]).

Pola partieco, privata profitemo kaj kverelo ricevis en 1926 j. severan lecionon, la sejmokratismo estis bridigita, la kompetenteco de la Prezidanto — plifortigita, la fisko ordigita kaj ekvilibrigita. Tuj kreskis la eksterlanda konfido al Polujo, kiu evidentiĝis en la tuja kursaltiĝo de polaj akcioj sur Eŭropaj kaj Amerikaj borsoj.

Sed la malnovaj historiaj fikutimoj ne facile mortas. En la Sejmo de 1928 j. komenciĝis ardega batalo inter la antaŭaj partioj kaj Senpartia Unuiĝo por Kunlaboro kun la Registara (S. U. K. R. — pola mallongigo: B. B. W. R.), kiu akiris en elektoj de 4-a marto gravan nombron de 122 senditoj kaj kreis fortan parlamentan klubon. Ĝia gvidanto estis Walery Sławek, malnova, sperta kunlaboranto de la Marŝalo, homo de senriproĉa nobleco kaj forta karaktero. Kuniĝintaj fortostreĉoj de la dekstraj kaj maldekstraj partioj sur Sejma tereno kaj grandega, ĉiurimeda agitado en la tuta lando kaj eksterlande, minacis per seriozaj ekscesoj kaj per malplifortigo de la Ŝtato. Multaj homoj de la adeptaro de Marŝalo Piłsudski turnis sin al li kun peto fini la minacan demagogion kaj interkonsente kun Prezidanto Ignacy Mościcki ŝanĝi la konstitucion, konforme al bezonoj de la tempo kaj forigante senfruktan kaj danĝeran batalon por la partiregado [2]).

[1]) Ibid. „1926 — 1929", p. 34.

[2]) Mi havis tiusencan memorindan interparolon kun la Marŝalo en Sulejówek en aprilo 1930 j.

— „La Sejmo estas por kontroli, sed ne por estri kaj regi — oni devas tiusence ŝanĝi la konstitucion“ — ili argumentis. Tamen la Marŝalo ne konsentis apliki la forton kaj alprenis la elektojn.

— „Polujo devas diri, kion ĝi volas! Ĝi elektos bone — pliboniĝos, ĝi elektos malbone — suferos! Tiamaniere la nacio lernas prudenton!“

La elektoj de 1930 j. havigas al. S. U. K. R. tiel grandan superecon (240 senditoj), ke de nun sejma laboro povis jam ruliĝi sur normala vojo. Pola Registaro atingis unuafoje konstantan plimulton en la parlamento. Ĝi estis grandega venko de prudenta kaj antaŭenvida politiko de Marŝalo Piłsudski, kiun timigis aŭ malĝustvojigis nek atencoj je lia vivo, nek ĵetataj sur lin kalumnioj, nek minacoj de revolucio...

Rigardante la kliniĝintan, elĉerpitan staturon kaŭze de granda fortostreĉo de la laboro kaj volo, oni havas impreson pri iu koloso, kiu dum longaj jaroj portegis kaj ĉiam portegas grandegan, superhoman ŝarĝon. Komence la fortostreĉo uzita estis por forigi la tombejan platon desuper la vive enterigita Patrujo. Sekve oni devis elkonduki la nacion, alkutimiĝintan al mallumo kaj sufokiga aero de la mallibereco, al suno kaj sur ondojn de libereco... Senenergia korpo de la nacio sentis doloron de tiu ĉi ŝanĝo, longe tuŝantaj vundoj, alkutimiĝintaj al premegantaj katenoj, rezultigis subitajn, senpripensajn ekmovojn... La vartisto de la Patrujo estis atakata kaj ofendata de la samlandanoj, senkonsciaj dank'al ekblovoj de la libereco kaj subita situaciŝanĝo...

Tamen Marŝalo Piłsudski ne ĉesas gardi plu la sekurecon kaj sanon de la nacio, malrapide resaniĝanta, konforme al morala ordono, ĵetita al si kaj al siaj soldatoj en la glora alvoko de 22.V.1926 j.:

— „Estas severa kaj fiera vero pri la militistoj. Ni ĉiuj havas unu komunan fratinon, regantan nian soldatan labo-

ron. Ĝi estas la morto, gilotinanta per la falĉilo tiun, kiun indikos la Dia fingro. Similajn servojn plenumas neniu alia, krom ni, militistoj. Tiaj ni estis, kiam ni prenis iam sur niajn ŝultrojn malfortetan kaj tremantan Pollandon, por redoni ĝin al la samlandanoj post lacegoj kaj venkoj forta kaj certa de vivo. Sed, ve, ni vidas ĝin en ĉiamaj disputoj kaj kvereloj, en iu regadvolupto de unuj super aliaj. Kaj kiam ĉirkaŭ ni furiozas partia kverelo kaj envio, kiam tremskuiĝas la malamo kaj ekscitiĝas la landparta malinklino, estus maleble, ke la militisto restu trankvila.

Kaj tamen mi volas esti certa, ke neniu alia ol la pola soldato vekiĝos unua, unua alpaŝos al interkonsento kaj frateco. Pensu do neniu malamiko, aŭ kontraŭulo, ke li povos trovi nian teron sendefenda. Ni ekstaros, kiel ĉiam, unu apud alia, por oferi la vivon al la Patrujo, kaj rememoro pri la maja militado en Warszawa, pri la bataloj, kiujn ni kondukis inter si, ne disigos nin, sed kunigos nin tiutempe, kiel rememoro pri la pasia konflikto inter la amantaj sian familion fratoj..."

— Por la tutaĵo de la limoj kaj por la sendependeco de Pola Ŝtato mi estas respondeca antaŭ miloj de soldatoj, pereintaj je mia ordono por konkiri ilin. Tial en la okazo, se la ekzistado de la Respubliko estus ekminacita, mi defendos ĝin ĉiurimede antaŭ ĉio kontraŭ ekstera malamiko... Rilate al internaj aferoj, mi opinias, ke la Poloj mem devas lerni regi, ĉar mi ne estas eterna kaj mi mem ne povas plenumi ĉion. — diris Marŝalo Piłsudski en Kunveturo de la Legionanoj en Lublin.

Supozeble tiukaŭze, foriĝinte de la estra regado, la Marŝalo retenis por si la oficon de Militministro kaj gvidadon de eksterlandaj aferoj, kiel senpere koincidanta kun la defendo de la Ŝtato kontraŭ eksteraj malamikoj. Cetere la potenca rebrilo de la Marŝalo kuŝiĝis sur ĉiuj aferoj kaj okazin-

taĵoj de nuntempa Pollando. Ĉiu de socialaj kaj politikaj agantoj, eĉ ekster lia adeptaro, devis senĉese senti sur si aglan ekrigardon de la grizaj okuloj de la Marŝalo, esplorantaj lin el-sub la arbustaj brovoj. Militistoj kaj edukitoj de la Marŝalo malkaŝe konfesis, ke ili ĉiam vidas antaŭ si lian saĝan, penetran, plenan de riproĉo aŭ de laŭdo rigardon, kiu direktas iliajn agojn, kiel pinglo de la kompaso.

Lastatempaj gvidantoj de la Ŝtato, ministrarestroj: Walery Sławek, Aleksander Prystor, Janusz Jędrzejewicz, kiuj efektivigis la plej gravajn reformojn kaj laborojn, ofte dum longaj monatoj ne vidis la Marŝalon, kaj tamen ili agadis konforme al liaj intencoj, ĉar ili apartenis al malnovaj, longjaraj kunlaborantoj de la Marŝalo, kiujn penetris lia spirito kaj opinio.

Tiuj ĉi opinioj de Marŝalo Piłsudski, lia respekto al fortostreĉoj de la volo, lia aprobo al laboremo, plenumemo kaj sinofero, lia estimo al justeco kaj honorsento, kaj super ĉio lia kredo al moralaj fortoj de la homo, kapablaj venki plej grandajn malhelpojn — malrapide penetras ĉiam pli efike kaj pli profunde en la internon de la nacio, malrapide liberiĝanta de rememoroj pri la turmentiga milito kaj jarcenta mallibereco.

Vere diris unu el la ministroj kaj konsente konfirmas tion eksterlandaj observantoj de nia vivo, ke en nunaj tempoj, kiam la nacioj serĉas savon de siaj embarasoj en la transdono de la regado al manoj de la „diktatoroj", ni, Poloj ne bezonas eksperimenti tion, ĉar: „ne de hodiaŭ ni povis ariĝi apud la aŭtoritatulo, kreskinta el neelĉerpeblaj meritoj rilate al la nacio kaj Ŝtato en daŭro de la pasinta periodo de nia historio, apud la aŭtoritatulo, kiu de la unua momento de la renaskiĝo de la Respubliko estas centro de kristaliĝo de pola ŝtata penso kaj efektiva reganto de animoj en la nacio. La ekzisto de tiu ĉi morala potenca aŭtoritatulo liberigas nin

de nepreco krei registaran autoritaton en ĝia radikala formo, ĉiam do dolora, ĉar ligita kun la devigo“ [1]).

Sub la influo kaj laŭ la indikoj de Marŝalo Piłsudski oni alpaŝis tuj post la maja revolucio (1926) al unu el plej gravaj reformoj en nia komuna vivo, al plibonigo de nia maltaŭga marta konstitucio, aperinta en tempo de plej akraj internaj bataloj kaj partiaj registaroj. Post tri jaroj de intensa laboro de Konstitucia Komisio, sub gvidado de estinta justecministro Stanisław Car kaj kun partopreno de multaj eminentaj juristoj, estis komponita teksto de nova konstitucio, prezentita en Sejmo kaj voĉdone akceptita la 26-an de januaro 1934 j. Ĝi pligrandigas evidente la kompetentecon de la Registaro kaj Prezidanto de la Respubliko. Laŭ 12-a paragrafo Prezidanto de la Respubliko:

a) nomigas laŭ sia opinio kaj revokas prezidanton de Konsilantaro de Ministroj, kaj je lia propono nomigas kaj revokas ministrojn,

b) kunvokas kaj dislasas la Sejmon, tamen la dislaso de la Sejmo antaŭ paso de kadenco postulas kaŭzindikon,

c) decidas malfermon, prokrastigon kaj fermon de Sejma kaj Senata kunsido,

d) estas estro de militfortoj,

e) reprezentas ekstere la Ŝtaton, akceptas reprezentantojn de fremdaj ŝtatoj kaj elsendas reprezentantojn de Pola Ŝtato,

f) decidas pri la milito, paco,

g) faras kaj konfirmas kontraktojn kun aliaj ŝtatoj, — tamen la kontraktoj komercaj, doganaj, konstante ŝarĝantaj fiskon de la Ŝtato aŭ entenantaj devigojn al surmeto de novaj impostoj por la civitanoj, aŭ kaŭzantaj limŝanĝon —

[1]) Sejma parolado de ministro Br. Pieracki la 10-an de februaro 1934 j.

postulas antaŭ konfirmo la konsenton de ambaŭ leĝdonaj ĉambroj, esprimitan en la konstitucio,

h) okupigas ŝtatajn oficojn al li rezervitajn.

Al la Sejmo la nova Konstitucio (26-a par.) lasas jenajn rajton:

a) starigi proponon pri voto de la malfido al Regitaro;

b) alvoki ministrojn al konstitucia respondeco;

c) interpelacii la Registaron;

d) ĉiujaran aprobon de ŝtata budĝetfermo kaj absolutorian aljuĝon al Registaro;

e) plenumon de kontrolado de Ŝtatŝuldoj.

Regado de la Ŝtato ne apartenas al la Sejmo.

27) La Sejmo konsistas el senditoj, elektitaj en universala, sekreta, egalrajta, senpera kaj proporcia voĉdonado.

Kadenco de la Sejmo daŭras kvin jarojn.

Novajn elektojn ordonas Prezidanto de la Respubliko en tridektaga daŭro de dislaso de la Sejmo.

Voĉdonado okazos ne pli malfrue, ol post 60-a tago depost ordono de elektoj.

En voĉdonado ne partoprenos la militistoj, apartenantaj al mobilizita parto de la armeo aŭ militŝiparo.

28) Ĉiu civitano rajtas elekti sen diferenco de la sekso, kiu antaŭ la tago de elektordono estas 24 jaroj aĝa kaj posedas civil - kaj civitanrajtojn.

Esti elektata rajtas ĉiu civitano, posedanta elektorajton kaj 30 jaroj aĝa.

Organizaĵo de pola Senato estas sola en sia speco kaj diferencas fundamente de senatoj en tuta mondo. Jen estas difinantaj ĝin paragrafoj:

34) Senato estas Ŝtata Organo, respegulanta volon de plej aktivaj elementoj en konstruado de komuna bono.

La Senato, kiel dua leĝodona ĉambro, konsideras budĝeton kaj leĝojn, deciditajn de la Sejmo.

Super tio la Senato, same kiel la Sejmo, kvankam sen iniciat-rajto, partoprenas decidadon pri sekvantaj aferoj:

a) pri voto de la malkonfido por la Registaro,

b) pri leĝoj, redonitaj al la leĝodonaj ĉambroj por rekonsideri ilin kaŭze de la veto,

c) pri ŝanĝo de la konstitucio,

d) pri forigo de la ordonoj, enkondukantaj esceptan staton.

35) La Senato konsistas el 120 senatanoj, alvokitaj por sesjara periodo, en triono de la Prezidanto de la Respubliko, kaj en du trionoj per elekta vojo. Ĉiu-trijare cedas el ĉiu grupo duono de la senatanoj laŭ laŭvica alvoko.

La Prezidanto de la Respubliko povas ĉiutempe ordoni renovigi la Senaton en ĝia plena konsisto.

36) Elekti al la Senato rajtas civitanoj, kiuj estos konsiderataj per destinita regularformo kiel kondukantoj en laboro por komuna bono.

Elektorajton al unua Senato post leĝfortiĝo de la Konstitucio havas civitanoj, distingitaj per „Virtuti Militari" aŭ per „Kruco de la Sendependeco".

La rajton plenumi la senatoran mandaton havas la civitanoj, posedantaj rajton esti elektataj al la Sejmo.

La senatora titolo estas dumviva.

Senatoro povas esti realvokita al plenumado de la mandato. La mandatoj de senatoroj finiĝas en la tago de alvoko de iliaj sekvantoj.

Inter nun voĉdonita konstitucio kaj la konstitucio de 3-a Majo 1791 j. ekzistas certa simileco. La sama celado al altigo de la prestiĝo de ĉefa Registaro sur konvenan nivelon, la sama deziro plifortigi la plenumeblecon de la Registaro, la sama zorgo pri la civitanaj virtoj de la regantoj kaj regatoj. Tiam oni penis tiamaniere limigi la egoistan ludon de magnataj familioj, nun oni celas la moderigon de partiaj trompadoj same blindaj, egoistaj, malrespondecaj kaj mina-

caj por la Ŝtato. Efektivigi la konstitucion de la 3-a majo malpermesis la „Targowica“ kaj akompanantaj ĝin dispartigoj. Polujo de XVIII jarcento ne havis homon, kiu antaŭvidus la „Targowican“ kaj scius ĝin sukcese forigi. Polujo de XX. jarcento trovis tiun homon en Józef Piłsudski. Li ne nur liberigis Pollandon, sed reevitigis ĝian pereon, kaj sekve puŝis ĝin sur vojon de ekonomia kaj politika potenco.

Ni venke travivas la tutmondan krizon. La kunuloj kaj la malamikoj lernas nin estimi! Kaj kio estas pli grava en nimem kreskas la sento, ke ni fariĝas grava internacia faktoro — apogilo de monda paco.

Ne ekzistos plu la mondaj buĉadoj, terurigaj ruinaĵoj, sovaĝeco de la homaro kaj invado de novaj barbaroj, se Pollando estos potenca, ĉar Polujo, simile al la mondo, bezonas la pacon por feliĉo kaj disvolviĝo.

La forton de pola brako gardas kaj instruas siajn samlandanojn pri la kapableco de memregado — Józef Piłsudski.

Enkorpigita en Li, saĝa, antaŭvida Boneco estas la plej alta esprimo de la homaro, ĉar ĝi celas la plimalgrandigon de la sufero en la tutmondo, kio estas la plej alta tasko de L a H o m o.

15.II.1934

# KOMENTARIOJ

WACŁAW SIEROSZEWSKI, fama pola verkisto, unua Prezidanto de pola Literatura Akademio—nask. 1858. En 1878 j. li estis malliberigita pro politika laborista agado kaj ekzilita al Jakuck en Siberio. Pro sia scienca laboro pri la Jakutoj li estis premiita de la Petersburga Geografia Societo kaj dank'al ĝia penado — amnestiita. Amnestiita li revenis hejmen; en 1902/3 jj. li vojaĝis al Japanujo por studi Ajnan genton; en 1905, dum polaj liberecaj movadoj, li estis arestita, tamen li sukcesis forkuri eksterlanden. En 1914 j., 56 jaroj aĝa, li aliĝis al ulana taĉmento de Belina (vidu malsupre). Post milito li vojaĝis al polaj elmigrintaj centroj en Ameriko kaj Francujo. S. estis iama prezidanto de la Postmilita Pafista Asocio, kaj ĝis 1931 — prezidanto de la Profesia Asocio de Polaj Literaturistoj. En 1933 li estas elektita prezidanto de novfondita Pola Literatura Akademio.

Wacław Sieroszewski estas unu el la plej famaj reprezentantoj de egzotika verkado en Polujo. Oni komparas lin al Kipling kaj Loti, tamen li diferencas de ili, memstare disvolvigante sian talenton. Lia verkado estas senpere ligita kun la vivo kaj ĝi elkreskas el la vivo. Krom la denaska humaneco, esceptaj kondiĉoj de l'ekzistado, en kiuj S. komencadis sian literaturan verkadon, postlasis signon sur interrilatoj de l'verkisto al la objekto, distingante lin de ĉiuj ceteraj egzotikaj verkistoj en Pollando.

Sieroszewski ĉefe turnis la atenton al pejzaĝo, belege pentrante ĝin, kaj la tiea loĝantaro, en kiu li kapablis elserĉi parencan animon al tiu de kultura homo, por eltiri el ĝi bonege elsentitan psikologion de malamo, amo, sopiro, krimo, aŭ de senlima sinofero, personigitan en vivaj homaj unuuloj kun realismo de la naturalisto kaj kun precizeco de la scienca esploristo. En vico de lia verkaro plej valoraj estos ĉiam verkoj, apogi-

taj sur liaj realaj travivaĵoj kaj rimarkoj dum la ekzila periodo. La tuta verkado de Sieroszewski estas penetrita de la ĥeroa penso, kiun disvolis en li lia propra vivo, malfacila kaj plena de la sinofero al la ideo.

VERKARO DE W. SIEROSZEWSKI: „Dek du jaroj en la lando de Jakutoj" (1900) kaj „Koreo" (1905) — ambaŭ sciencaj studoj; „Sur limoj de arbaroj" (1894) — sub Kaŝnomo S i r k o; „En la reto" (1897) — ĝi enhavas la unuajn verkojn, skribitajn de 1884 dum ekzilo; „Risztau" (1899); „Tagiĝo" (1900) — ĝia plua eldono aperis sub titolo: „La fundo de l'mizero", tradukita ankaŭ esperante de la konata stila majstro dr. Kazimierz Bein (Kabe); „Idaro" (1901); „Ĥinaj rakontoj" (1902); „Reveno" (1903); „Forkuro" (1904)—sub kaŝnomo de K. B a g r y n o w s k i; „Al malproksima Oriento" (1904); „Ol Soni-Kisań" (1906); „El la mondo" (1909); „Geedziĝo" (1909); „De ondo al ondo" (1910); „Fabloj" (1910); „Trankvila rifuĝejo" (1913); „Noveloj" (1914); „Beniowski" kaj „Oceano" (1916/17); „Józef Piłsudski" (1915); „Al la libereco" V. I. „En la ungegoj" V. II. — „Ĉenoj" (1918/19); „Senfundaĵo" (1921); „Bolŝevikoj" (dramo, 1922); „Sur vulkanoj de Japanujo" (1924); „Post la arktika zono" kaj „Inter harkreskintaj homoj" (1926); „La amo de Samuraj" (1926); „Dalaj Lama" (1927, du volumoj); „Sinjoro Twardost-Twardowski" (hist. rak., 1930); „Cejlono" (1930); „Soldataj indikoj" (1920); „Defendo de la Patrujo" (1921); „Marŝalo Józef Piłsudski. Biografio" (1934, en jena esp-a traduko). Opa eldono de la verkaro de W. Sieroszewski aperis dum 1922 — 1926 jj. en 14 volumoj.

---

*Al paĝo 5.*

ZUŁOWO — vilaĝo, 22 km. okcidente de Święciany.

ŚWIĘCIANY — distrikta urbo en Wilna vojevodujo.

RIBELO DE 1863 J. — la glora pola nacia resurekcio kontraŭ rusa okupado.

MURAVJEV M. M. (1796 — 1886) — nomata pendigisto, unu el plej severaj persekutanoj de Poloj kaj poleco.

PROFETOJ — estis Mickiewicz, Słowacki kaj Krasiński, predikantaj sendependiĝon de Polujo. Plej grandaj polaj naciaj poetoj, konataj al esperantistaro en majstraj tradukoj de Antoni Grabowski.

*Al paĝo 6.*

ŻMUDŹ — litove Zamaitis, lando inter Orientprusujo kaj Kurlando. Iama aparta pola distrikto.

BRONISŁAW PIŁSUDSKI (1866 — 1918) — frato de la Marŝalo, etnografiisto kaj lingvisto. Punita je 15 jaroj de devigaj laboroj sur Saĥalin pro la atenco je caro Aleksandro III.

*Al paĝo 7.*

POBIEDONOSCJEV K. P. — rusa politikisto, ĉiopova konsilanto de du lastaj caroj. Severa reakciulo.

*Al paĝo 8.*

IGNACY DASZYŃSKI, nas. 1866, — pola politikisto, kreinto de socialista partio, aŭstra kaj pola parlamentano.

*Al paĝo 9.*

„NACIA VOLO" — ruse „Narodnaja Wolja", rusa social-revolucia partio, aplikanta politikan teroron.

DORPAT — estone Tartu, urbo en Estonujo. De 1582 ĝis 1625 ĝi apartenis al Pollando.

*Al paĝo 10.*

KIREŃSK — urbo en Siberio.

*Al paĝo 11.*

TUNKA — siberia vilaĝeto.

P. S. P. — Pola Socialista Partio — Polska Partja Socjalistyczna, P. P. S., fondita 1892 j.

*Al paĝo 12.*

„ROBOTNIK" — „La Laboristo" — iama sekreta revuo socialista, eldonata, redaktata kaj presata de Józef Piłsudski dum 1894 — 1900 jj. sur rusa okuptereno.

*Al paĝo 13.*

LIPNISZKI — malgranda urbeto en Wilna vojev.

ŁÓDŹ — nuna ĉefurbo de la sama vojev., okcidente de Warszawa. 600 000 loĝ. Centro de pola teksta industrio.

KRAKÓW — iama ĉefurbo de pola Respubliko, nune vojev. 250 000 loĝ. Jagiellona Universitato de XIV jc. Interesa historia urbo.

REĜOLANDO — pole Królestwo, parto de Polujo iam okupita de rusoj.

P. S. D. P. — Pola Socialdemokrata Partio — Polska Partja Socjal-Demokratyczna.

GALICIO — de 1772 ĝis 1918 jj. krona lando de Aŭstrujo, kreita el la teroj, konkiritaj de Pollando dum la dispartigoj.

*Al paĝo 14.*

MANĜURIO — hodziaŭa Manĵu-kuo.

„HISTORIAJ KANTOJ“ — verko de Juljan Ursyn Niemczewicz (1757 — 1841) pola poeto.

*Al paĝo 15.*

GRZYBOWSKI - PLACO — unu el multnombraj placoj en Warszawa.

*Al paĝo 17.*

„BEKOJ“ — kondukantoj.

LWÓW — vojev. urbo en sudorienta parto de Pollando. 220 000 loĝ. Universitato de Jan Kazimierz, fond. 1656. Politekniko.

DUMO — de 1906 — 1917 rusa parlamento, kelkfoje dislasata kaj rekunvokata.

*Al paĝo 18.*

BEZDANY — vilaĝo en Wilna distrikto.

KOŚCIUSZKO TADEUSZ (1746 — 1817) — fama pola nacia ĥeroo, Usona generalo, ĉefo de pola Nacia Armita Forto. Li batalis kontraŭ fremdlandaj okupintoj de Polujo. Post malsukceso de sia militado li forveturis en Usonon, kie li batalis por ĝia libereco kontraŭ Anglujo.

1831, 1846, 1863 — jaroj de polaj naciaj resurekcioj kontraŭ la okupintoj.

MALGRANDA POLUJO — teritorio kun ĉefurbo Kraków.

JAN III SOBIESKI (1624 — 1696) — ĥeroa pola reĝo, fama venkinto de Turkoj apud Vieno en 1663 j.

*Al paĝo 19.*

PAFISTA ASOCIO — sekreta pola militistara organizaĵo (pole — Związek Strzelecki), aganta sur aŭstra okuptereno. Kreinto — Józef Pił sudski.

*Al paĝo 20.*

KRONO — aŭstra mona unuo de 1892 j.

„VERDLOJ“ — malnovaj kaj maltaŭgaj karabenoj.

KIELCE — vojev. urbo, sudokcidente de Warszawa.

BELINA — Władysław Prażmowski, nask. 1888, regimentestro, kunkreinto de pola kavalerio.

*Al paĝo 21.*

CHĘCINY — urbeto, 19 km. de Kielce.

BRZEZINY — distr. urbo en vojev. Łódź.

SOSNKOWSKI KAZIMIERZ — nask. 1885, nuna pola generalo, antaŭmilite — stabĉefo de la Pafista Asocio.

KRZESZOWICE — vilaĝo, 26 km. de Kraków.

TROJANOWSKI — Legiona Regimentestro.

ĈEFA NACIA KOMITATO, Ĉ. N. K. — pole Naczelny Komitet Narodowy, N. K. N., — fondita en aŭgusto 1914 en Kraków, ĝi konsistis el reprezentantoj de ĉiuj polaj partioj en aŭstra okuptereno.

NACIA KOMITATO, N. K. — pole Komitet Narodowy — fondita dum Granda Milito en Parizo de pola elmigrintaro.

*Al paĝo 24.*

BARANOWICZE — distr. urbo en Polujo, oriente de Warszawa.

DOWBOR - MUŚNICKI Józef, nask. 1867, generalo. Somere 1917 li estis nomigita korpusestro de Pola Ĉefa Militistara Komitato en Rusujo.

*Al paĝo 25.*

BOBRUJSK — distr. urbo, apud Berezina.

*Al paĝo 27.*

DĘBLIN — pola fortikaĵo apud enfluo de Wieprz al Wisła.

BESELER HANS (1850 — 1921) — prusa generalo, konkirinto de Antwerpeno en 1914 j. En 1915 — 1918 general-guberniestro de parto de Polujo okupita de Germanoj.

*Al paĝo 28.*

CIESZYN — Apudlima urbo, dividita inter Pollando kaj Ĉeĥoslovakujo.

LUBLIN — malnova, historia pola urbo, nuna vojev. Universitato.

RYDZ - ŚMIGŁY EDWARD — nask. 1886, generalo, Pafista Asociano kaj Legionano, 1917/18 komandanto de P. O. W. Armeinspektoro.

11 DE NOVEMBRO 1918 — tago de definitiva sendependiĝo de Pollando — reveno de Marŝ. Piłsudski el Magdeburg.

*Al paĝo 29.*

CURZON'A LINIO — orienta limo de Pollando, difinita per decido de la Plejalta Antanta Konsilantaro en decembro 1919 j.

ŁOMŻA — distr. urbo.

BIAŁA SIEDLECKA — urbo.

*Al paĝo 30.*

SEJMO — Pola Parlamento.

MORACZEWSKI JĘDRZEJ — inĝ., politikisto, PPS-ano, aŭstra kaj pola parlamentano, kelkfoja ministro.

PADEREWSKI IGNACY — mondfama pola muzikulo, majstro kaj komponisto, Nacia Komitatano en Parizo, iama ministrarestro.

*Al paĝo 32.*

POZNAŃ — apud rivero Warta, vojev. urbo. 250 000 loĝ. Universitato.

POMERANIO — pole Pomorze — malnova pola landparto apud Baltika maro kun granda moderna haveno Gdynia.

GDAŃSK — germane Danzig.

BELVEDERO — varsovia palaco, konstruita en suda parto de Warszawa por iama rusa Granda Princo Konstantin en 1823 j. Nuna loĝejo kaj laborejo de Marŝ. Piłsudski.

*Al paĝo 34.*

JAGIELLONA EPOKO — en la pola historio estis la plej glora periodo de Jagiellona litova dinastio sur pola reĝotrono (de 1386 ĝis 1572). Fondis ĝin Władysław II Jagiełło, Granda Princo Litova.

KRONO — Pola Respubliko.

KIJEV — ukraine Kijv, pole Kijów — nuntempa ĉefubro de Ukrainujo.

WISŁA — Vistulo, plej granda pola rivero, fluanta meze de la lando.

*Al paĝo 35.*

RUĜA MILITISTARO — bolŝevika, komunista militistaro.

*Al paĝo 36.*

WIEPRZ — dekstra alflua rivero de Vistulo, sude de Warszawa.

GRODNO — distr. urbo sur dekstra bordo de Njemen.

STANISŁAW WOJCIECHOWSKI — nask. 1869, la dua Prezidanto de Pola Respubliko. Konata kooperativisto.

GABRJEL NARUTOWICZ (1865 — 1922) — la unua Prezidanto de Pola Respubliko en 1922 j. Mondfama scienculo.

SULEJÓWEK — somera ripozejo de Marŝalo Piłsudski.

*Al paĝo 39.*

SŁAWEK WALERY — nask. 1876, Pafista Asociano, Legionano, Prezidanto de Ĉefa Estraro de la Asocio de Legionanoj. Kreinto de S. U. K. R. kaj ĝia prezidanto, en 1930/31 dufoja ministrarestro.

IGNACY MOŚCICKI — nask. 1867, dr. inĝ., profesoro de Lwow'a, Politekniko, fama scienculo-ĥemiisto, nuntempa Prezidanto de Pola Respubliko.

*Al paĝo 42.*

PRYSTOR ALEKSANDER — nask. 1865, pola politikisto, iama PPS-ano. Kelkfoja ministro, en 1931 ministrarestro.

*Al paĝo 45.*

„VIRTUTI MILITARI“ — milita ordeno, kreita de la lasta pola reĝo Stanisław August Poniatowski en 1792 j.

„KRUCO DE LA SENDEPENDECO“ — ordeno.

KONSTITUCIO DE LA 3-a MAJO 1791 J. — alie „Registara Konstitucio“, akceptita dum kvarjara Sejmo, estis unua pola Konstitucio en moderna signifo.

*Al paĝo 46.*

TARGOWICA — malgranda urbeto en distr. Humań (Ukrainujo). Tie ĉi estis fondita en 1792 j. la konfederacio de polaj perfiduloj kontraŭ la 3. maja Konstitucio.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA
KUL
Esperanto
918 II

Biblioteka Uniwersytecka KUL
1001144594